
tejo tutmonde

tutmonda esperantista junulara organizo



**Ŝanĝiĝo
de gard-
istoj en
la *TT*-
redakcio**

**Estrara
Jarraporto**

IJK-aligilo!

**TEJO havas
novan prezidan-
ton, kaj *TT* -
novan redaktoron!**



Kun miksitaj sentoj mi skribas ĉi tiun redaktoran saluton – mian lastan kiel redaktoro de TEJO Tutmonde. Unuflanke mi sentas sen-

ŝargiĝon pro tio ke la vicedaktoro kaj mi ne plu estos tiel okupategaj kiel ni estis ĝis nun. Kaj certe ne mankos al ni la konstantaj penoj akiri taŭgajn materialojn por la revuo. Sed aliflanke mi sentas ian malgajecon forlasante la redaktadon de TT. Certe la vojo ne ĉiam estis glata, nek facila - sed io vere inda ne povas esti facila. Estis ja ĝuo kaj honoro servi al la Movado pere de TT.

Mi volas danki al mia talenta koleĝino – kiu, hazarde, estas ankaŭ mia edzino – Jenja, sen kies lerta grafikado, aspektigado kaj kunredaktado TT ne estus en la bona formo kiun vi ĝuis dum la pasintaj tri jaroj.

Mi volas danki al ĉiu kiu kontribuis artikolojn kaj aliajn materialojn al TT – kaj aparte al Aleks KADAR, kiu dum sia deĵoro kiel ĝenerala sekretario de TEJO donis firman, konstantan kaj fidelan subtenon al TT.

Nu, venis la tempo transdoni la torĉon. Do, per tiuj ĉi vortoj mi konfidas la TT-redakcion al Marcos CRAMER, nova redaktoro de TT. Gratulojn, Marcos, kaj bonvenon!

Dankon al vi, karaj legantoj – kaj ĝis la revido ie en Esperantujo!

Joel

Ne forgesu rekotizi!

Jes, jam alvenis la tempo por remembrigi en TEJO (aŭ re-patroniĝi) por 2007. Bonvolu frue rekotizi por ke via ricevado de *Kontakto* kaj *TEJO Tutmonde* ne estu interrompita. Ne forgesu ke, krom ricevado de la interesaj kaj informplenaj TEJO-revuoj, via membreco rajtigas vin ricevi rabaton je la partoprenkotizo de la IJK (kiu en 2007 okazos en Hanojo, Vjetnamio!)! Memoru, TEJO estas via asocio — helpu ankaŭ vi ke ĝi estu forta kaj aktiva en 2007! Kontaktu la Centran Oficejon, aŭ aliĝu rete ĉe: www.uea.org/alighoj

<Enhavo>

Prezidanta Saluto	3
Jarraporto de TEJO 2005-2006	4-10
Monda Kalendaro:	
La Esperanto-Movado Flugrigarde.....	11
Esperanta teatra studio en Jalto.....	11
TT Havas Novan Redaktoron!.....	12-13
Indymedia: jam pli ol du jarojn en Esperanto!	14
IJK-aliĝilo.....	15-18
Letero el Kubo	19
Pedibus en Odeso	20-21
Piratado kaj Sabotado de Esperanto-Muziko	22-24
Kunveno en Toruń.....	25
Eŭropa Tago de Lingvoj	25
La loko	26-29
Ni Verku por la Esperantlingva Vikipedio!	30
Ago-Tago en Bydgoszcz	30
Recenze	31
Adiaŭ!.....	32

TEJO Tutmonde estas dumonata oficiala gazeto de TEJO pri la junulara Esperanto-movado. Ĝin ricevas ĉiuj individuaj membroj kaj patronoj de TEJO. Landaj junularaj Esperanto-organizoj povas ricevi ĝin.

Kontribuojn sendu (prefere) rete al tejo-tutmonde@tejo.org (per normala mesaĝo aŭ kiel WORD-dosiero), aŭ paperpoŝte al la adreso: **TEJO Tutmonde, 16800 Phillips Rd., Alpharetta GA 30004, Usono**. Fotojn/bildojn sendu kiel JPEG. **Viaj kontribuoj estas bonvenegaj kaj necesaj!**

Redaktoro: **Joel AMIS** (Usono). Vic-redaktoro kaj kompostistino: **Jenja AMIS** (Ukrainio/Usono).

Demandojn pri membrecoj, abonoj, distribuo ktp. sendu al: TEJO, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando; rete: oficejo@tejo.org. Presado: SKONPRES, Bydgoszcz, Pollando; rete: skonpres@poczta.onet.pl. **La redakcio kaj la eldonanto ne respondecas pri la opinioj de unuopaj aŭtoroj.**

Prezidanta Saluto



Saluton,

Mi volas finfine kapti la okazon saluti vin ĉiujn kiel nova prezidanto de TEJO. La lastaj monatoj bedaŭrinde alportis ŝanĝojn ene de TEJO. Unue, Heming Welde THORB-JØRNSEN demisiis pro personaj kialoj, kaj poste nia freŝelektita kasistino Adenjo CHARRIÈRE (ŝi elektiĝis dum la Sarajeva IJK) demisiis pro laboraj kialoj. Feliĉe, ili ambaŭ sukcesis anstataŭigi – Katja IGNATJEVA pretis repreni la taskon kiel kasistino de TEJO, kiun ŝi dum la lastaj jaroj heroe faris (kvankam ne tre videbla en diskutoj, Katja arde laboregas por teni financan superrigardon kaj ŝi plurfoje savis TEJO-n de repagoj de subvencimono). Prezidanto iĝis mi. Aldone, mi ĝojas raporti ke ni trovis kaj novan redaktoron por *TEJO Tutmonde* – Marcos CRAMER, kaj novan volontulinon – Katarzyna-n MARCINI-AK. Samtempe la estraro kaj mi ŝatus danki Martenon kaj Joel (kaj ankaŭ Heming kaj Adenjo) pro ilia farita laboro.

Vi ja scias ke la estraro gvidas la organizon. Tio signifas ankaŭ ke ĝi difinas la agadon de TEJO. Pro la ŝanĝoj ni redifinis nian agadon, kaj dum nia lasta laborkunsido decidis ke dum la restanta estrarperiodo ni volas koncentriĝi je videbligado de TEJO. Nia celo estas plibonigi TEJO-n tiel ke vi pli bone konsciu pri la servoj

kiujn ni nun proponas (kiel la eblo partopreni niajn trejnseminariojn, ricevi niajn revuojn *Kontakto* kaj *TEJO Tutmonde*, kiuj ĵus venis al vi, Pasporta Servo kaj rabato ĉe la IJK kaj la IS). La unua paŝo estas montri kion TEJO jam proponas, kaj en la dua paŝo necesas provi trovi pli da utilaj servoj por vi kaj via landa sekcio. Pro tio ni ĝojus aŭdi vian opinion pri tio kiel plibonigi TEJO-n. Ni kreis foruman temon ĉe <http://www.tejo.org/eo/node/239> kie vi povas doni viajn komentojn kaj ideojn. TEJO estas via organizo, kaj nur kun via helpo ni povas vin bone servi!

Kunlaboreme,
David-Emil WICKSTRÖM

Karaj,
Bv. atenti la novan poŝtan adreson de TT:
TEJO Tutmonde (Marcos CRAMER)
p.A. Uljana Tschistjakow
Nuernberger Strasse 27a
04103 Leipzig
Germanio
La retadreso restas la sama –
tejo-tutmonde@tejo.org

Karaj estraranoj,

Post longa pripensado, mi decidis demisii (ekde hodiaŭ, lundon, 25-an de septembro, 2006) de mia kasista posteno. Miaj novaj funkcioj (konfidencaj) ne plu permesas al mi plenumi miajn engaĝiĝojn kun Esperanto.

Mi deziras al vi sukcesoplenan daŭrigon (kun mia plena respekto kaj dankemo) kaj dankas vin pro via apogo kaj aprezo dum ĉiuj tiuj momentoj.

Plej sincere,
Adenjo

Jarraporto de TEJO 2005-2006

Enkonduko kaj ĝeneralaĵoj (raportas David-Emil WICKSTRÖM, prezidanto de TEJO kaj TEJO-estrarano pri IJK)

Jen la jarraporto por la jaro 2005-2006. Pro diversaj kialoj ĝi iom malfruas kaj ni ege bedaŭras tion. Ankaŭ okazis intertempe prezidanta ŝanĝiĝo. Pro personaj kialoj Heming Welde THORB-JØRNSEN demisiis, kaj kiel nova prezidanto elektigis David-Emil WICKSTRÖM. La tuta estraro volas danki al Heming pro lia laboro dum la lasta jaro! Ankaŭ Katja IGNATJEVA volis demisii, kaj estis elektita Adenjo CHARRIÈRE, sed ŝi demisiis post monato pro laboraj kialoj kaj Katja pretas repreni la postenojn ĝis nova kasisto estos trovita. Grandegan dankon al Katja pro la farita laboro kaj preteco daŭrigi.

Post la elektoj pasintjare TEJO ekhavis relative freŝan estraron – nur Katja IGNATJEVA restis el la malnova estraro (sed ŝi elektigis nur sub la kondiĉo ke troviĝos posteulo ene de unu jaro). Tamen la novaj estraranoj estis longtempaj aktivuloj en TEJO kaj profitis de siaj movadaj spertoj en siaj estraraj postenoj. Prioritatoj por la nova estraro estas: aktivula trejnado, plibonigo kaj aktualigo de la TEJO-retpaĝaro, landa agado (aparte en Afriko), eksteraj rilatoj kaj plividebligo de la elektoprocezo pri IJK-gastiganto. Kompreneble ankaŭ la regulaj taskoj restas gravaj. Entute la estraro bone kunlaboris kvankam kelkaj estraranoj malaperadis pro diversaj kialoj dum mallongaj periodoj.

Oficisto

Nuntempe estas sufiĉe da mono en la oficista

poto por dungi duontempan oficiston. La estraro starigis taskaron por la oficisto kaj faris du oficistajn profilojn: Monakira Oficisto kaj Administra Oficisto. La laboro pri oficisto stagnis post la printempa estrarkunsido pro diversaj kialoj. Ni esperas reeki pri ĝi en la aŭtuno.


Administrado (raportas Valentina SIDOROVA, ĝenerala sekretario de TEJO)

Estrararo

La estraro por la periodo 2005-2007 estis elektita dum IJK 2005 en Zakopane, Pollando. Laŭ la rekomendoj de la elekta komisiono (Anna-Laura WICKSTRÖM, Gregor HINKER kaj Ilja de COSTER), la komitato elektis sep-kapan estraron konsistantan el Heming Welde THORB-JØRNSEN, prezidanto, Katja IGNATJEVA, kasisto, Valentina SIDOROVA, ĝenerala sekretario, David-Emil WICKSTRÖM, estrarano pri aktivula trejnado, kongresoj kaj seminarioj, Chuck SMITH estrarano pri informado, Haris SUBAŠIĆ, estrarano pri eksteraj rilatoj, Francois HOUNSOUNOU, estrarano pri landa agado kaj afrika agado.

Estrarkunsidoj

La estraro kunsidis dufoje dum la lasta jaro: en septembro 2005, en la Centra oficejo (CO) en Roterdamo, kun ĉeesto de Ans BAKKER, UEA-estrarano, kaj Osmo BULLER, Ĝenerala Direktoro de UEA, kiel reprezentantoj de UEA. Dufoje, en aprilo 2006, ankaŭ en la CO kun partopreno de Osmo BULLER. Unu semajnon antaŭe Chuck SMITH kiel reprezentanto de TEJO ĉe UEA partoprenis la UEA-Estrarkunsidon en la CO.



Dum sia unua estrarkunsido la nova estraro ellaboris la ĉefan prioritaton por la venontaj du jaroj. Tio estas tutmonda agado koncentrita je aktivula trejnado, landa agado kaj eksteraj rilatoj.

Regule, ĉiun duan merkredon de la monato kunsidis la estraro rete, per la tujmesaĝilo YahooMessenger.

Komisiitoj

Kiel komisiitoj, homoj kiuj laboras pri speciaj kampoj, daŭre oficas: Anna-Laura WICKSTRÖM, landa agado en Eŭropo (TEJK), Giovanni GROSSI, financoj. François HOUNSOUNOU, kiu estis elektita dum IJK 2003 kiel komisiito pri landa agado en Afriko, estraranigis, daŭre okupiĝante jam ene de la estraro pri la sama kampo. Aliaj komisiitoj estas: Martin MINICH, volontulo en la CO ekde novembro 2004, Joel AMIS, redaktoro de *TEJO Tutmonde*, Derk EDERVEEN, kompilanto de *Pasporta Servo*, kaj Ĵenja AMIS, redaktoro de *Kontakto*.

Komitato

La Komitato, kiu oficis de la jaro 2004 ĝis la unua duono de 2006 konsistis el 20 komitatanoj A de Landaj Sekcioj (LS), tri komitatanoj A de Fakaj Sekcioj (FS) kaj kvin komitatanoj B (tri el kiuj estraranigis en 2005). En 2006, kiel elekta jaro por la Komitato, estis (re)nomumitaj 20 reprezentantoj de LS-oj (el 44 eblaj laŭ la nombro de LS-oj), du reprezentantoj de FS-oj (el tri) de TEJO. Kaj kvankam la kvanto de la membraro permesas elekti ses komitatanojn B, sian deziron esprimis nur du personoj, kiuj aŭtomate estas konsiderataj kiel elektitaj, sen voĉdonoj. Malĝojiga estas la fakto ke la TEJO-membroj ne emas aktivi ene de la Komitato. Bedaŭrinde ke ne venis respondoj de ĉiuj LS-oj pri nomumoj; kelkaj indikitaj adresoj evidentiĝis malaktualaj. Tia malbona komunikado ĝenerale mal-

faciligas la kunlaboron inter TEJO kaj la LS-oj.

En novembro la diskutoj el la komitatlisto komitato@tejo.org transiris al nova TEJO-komitato@listoj.ikso.net laŭ la propono de David-Emil. Diskutoj en ambaŭ listoj ne estas aparte viglaj.

Komitataj cirkuleroj regule aperis ĉiumonate ekde septembro 2005. Kutime kontribuoj ne multas kaj venas ĝenerale de la apartaj estraritanoj kaj komisiitoj. Estonte dezirindus ke komitatanoj kaj komisiitoj pli uzu diversajn internajn komunikadservojn, inkluzive cirkulerojn.

Komitatkunsidoj

La Komitatkunsido dum IJK 2005 en Zakopane estis kvoruma kun la minimumaj 21 voĉoj. Krom la laŭregularaj tagorderoj, oni diskutis plurajn temojn, starigis la fondaĵon Freŝa Vento, kaj modifis reglamenton pri *TT*. VEJO (Vjetnama Esperantista Junulara Organizo) akceptiĝis kiel nova Landa Sekcio kaj NEJO (Nepalo) kiel observanto ĉe TEJO. Krome oni elektis la estraron por 2005-2007.

Dum IS 2005/2006, la Komitato denove kunsidis, senkvorume kaj sekve neformale, kaj pridiskutis kelkajn aferojn, ekzemple la retan version de PS, TEJO-dungitojn, kaj landajn kategoriojn por IJK.


Komitatanoj A de TEJO ĉe UEA

Por la periodo 2004-2007 estas: Sonja PETROVIĆ kaj Bertrand HUGON.

Membroj

Dum lastaj 10 jaroj, surbaze de la UEA-datenbazo, la membraro evoluis jene: [vd. tabelon 1]

La ĉi-supra statistiko montras kreskon de la



Tabelo 1. TEJO-Membraro

Jaro	Junaj membroj kun jarlibro (MJ-T)	Junaj membroj abonantoj + revuo Eo (MA-T)	Junaj dumvivaj membroj (DMT)	Junaj dumvivaj membroj kun jarlibro (DMJ-T)	Sumo individuaj membroj (IM)	Dumvivaj patronoj (DPT)	Unujaraj patronoj (PT)
2005	361	131	29	13	534	21	64
2004	267	137	25	10	439	21	76
2003	231	139	23	6	399	18	71
2002	235	161	18	5	419	17	82
2001	337	201	22	0	560	17	90
2000	350	241	19	0	610	17	94
1999	451	220	17	0	688	14	96
1998	451	260	17	0	728	13	100
1997	598	277	17	0	892	12	101
1996	550	274	19	0	843	11	108
1995	410	310	19	0	739	12	92

membronombro dum la lastaj du jaroj, kio donas signifan esperon atendi pliajn membrojn en sekvaj jaroj.

Landa Agado (raportas François HOUN-SOUNOU, TEJO-estraro pri landa kaj afrika agado)

En Afriko la laboro komenciĝis per la diskutlisto “TEJO-Afriko” helpe de Aleks KADAR. Ne nur afrikanoj aliĝis al la diskutlisto sed ankaŭ la ne-afrikanoj kies celoj estas interveni en la junularan movadon en Afriko. Kelkaj retkunsidoj okazis por pritrakti la gravajn aferojn rilate la junularan organizadon. La lasta okazis la 1-an de oktobro, 2005, kies rezulto estas organizigi la afrikan junularan kongreson en Ganao. La informo estas dissendita al la aliaj.

La ĵus elektita TEJO-estraro pri landa kaj afrika agado retmesaĝis al Aleks KADAR, la iama ĝenerala sekretario de TEJO por gardi la kontakton kaj plu kunlaboradi kun li por spertiĝi. Aleks fariĝis lia konsilanto.

Oni laboradas por afrika kandidatiĝo por esti IJK-gastiganto en la baldaŭa estonteco. La TEJO-estraro pri landa kaj afrika agado eksondis pri monfontoj por okazigi trejnseminaron en Afriko dum la venonta jaro. Pro tio, li petas ĉiujn volontulojn helpi lin trovi mon-

fonton por la realigo de la trejnseminario en Afriko. Se ne, Afriko ŝajnas esti forgesita koncerne tia(j)n TEJO-aranĝo(j)n.

En decembro 2005 UEA rajtigis la TEJO-estraron pri landa kaj afrika agado aliĝi al pluraj diskutlistoj kaj transpreni la reorganizadon de la afrika movado. Li forte agadis kunlabore kun UEA kaj la Centra Oficejo de UEA

pri la translokiĝo de la Afrika Oficejo (AO) el Togolando en Beninon. Li transprenis la postenon de la Komisiito de Afrika Oficejo respondeca pri ILEI kaj TEJO. En januaro li gvidis delegacion de UEA en Afriko al Bamako por tie prelegi pri Esperanto dum la Monda Socia Forumo.

La TEJO-estraro pri landa kaj afrika agado multe kunlaboris kun la organiza teamo en Sudafriko por okazigi la TEJO-aktivaĵojn dum la sudafrika kongreso kiu okazis aprile–maje kaj pretis transpreni la gvidadon de aktivaĵoj. Bedaŭrinde pro la vojaĝkosto li ne sukcesis vojaĝi tien.

La TEJO-estraro pri landa kaj afrika agado kunlaboris kun la komisiito pri Freŝa Vento, Daniela TAGLIAFICO. La nuna paŝo estas pristudi la projektojn alvenintajn dum UK kaj IJK.

Bedaŭrinde, neniu el Afriko kandidatiĝis kiel komitatano, kvankam la TEJO-estraro pri landa kaj afrika agado retmesaĝis al ili por kuraĝigi ilin kandidatiĝi. Eĉ Adjevi Adje, kiu komence pretis sendi sian kandidatiĝon, ne povis sendi. Li klopodas ke dum la venontaj monatoj iuj inter ili kandidatiĝu por la posteno de komisiito. Li nun kalkulas je la forto de Floent Ntoto el Kongo, Anagovi Ahmed el Niĝerio kaj Joseph Tchokpodo el Benino. Li

esperas transdoni la torĉon de TEJO al iu inter ili por daŭrigi la agadon de TEJO en Afriko.

Unuopaj retmesaĝoj estas adresitaj al kelkaj landaj sekcioj por scii kiel evoluas la Movado. Pozitivajn respondojn ricevis la TEJO-estraro pri landa kaj afrika agado. Rilate al Benino, la junulara sekcio survojas al fondiĝo.

Renkontiĝoj (raportas David-Emil WICKSTRÖM, prezidanto de TEJO kaj TEJO-estraro pri IJK)

IJK

Farende de mia antaŭulino restis aprobi la raporton de la IJK en Zakopane. Tio ĉi okazis dum la estrarkunsido en aŭtuno 2005. La IJK estis sukcesa kun 456 partoprenintoj el 40 landoj kaj profito de EUR 7395,73 (el tiu ĉi sumo triono iris al la LKK, triono al la junulara fondaĵo de UEA kaj triono al la rezervo IJK).

Krome mi sekvis la preparlaborojn de la IJK 2006 en Sarajevo. Kadre de la preparlaboro mi ĉeestis LKK-kunsidon en Sarajevo komence de aprilo 2006.

Por la IJK 2007 kandidatiĝis du landoj, Koreio kaj Vjetnamio. Post pritraktado de ambaŭ kandidatiĝoj la TEJO-estraro elektis Vjetnamion. La kontrakto jam estas subskribita inter la LKK, UEA kaj TEJO kaj la unuaj preparlaboroj ekis.

Unu el miaj celoj estas plifaciligi kaj iomete travidebligi la kandidatiĝan proceduron. Pro tio mi verkis manlibron pri tio kiel kandidatiĝi por la IJK kaj kreis retpaĝon pri la kandidatiĝprocezo (<http://www.TEJO.org/node/12>). Aldone, verkigas manlibro pri tio kiel organizi renkontiĝojn en la TEJO-vikio, kie aktivaj kaj antaŭaj organizan-

toj estas invititaj kontribui per siaj spertoj. Ĝi troveblas ĉe http://www.TEJO.org/vikio/Manlibro_Pri_Organizado_De_Renkontiĝoj

Seminarioj kaj aktivula trejnado

Pri aktivula trejnado Ilja de COSTER iomete pli profunde okupiĝis. Bedaŭrinde, subvencipeto ĉe EJF kiun ni faris aŭtune 2005 ne estis akceptita. Sed, des pli ĝoje, estis akceptita peto ĉe la *Youth*-agentejo en Belgio printempon 2006. La seminario okazos en aŭtuno 2006 en Bruselo, kaj la titolo estas “Komuniki lingvajn rajtojn en integriĝanta Eŭropo”.

Krome okazis aktivultrejnadseminarieto pri renkontiĝa mastrumado dum la IJK en Sarajevo.

Mi ŝatus nome de la TEJO-estraro danki miajn antaŭulojn Nastja KOJEVNIKOVA, Sonja PETROVIĆ kaj Ĵenja GAUSS por ilia bonega laboro!

Informado kaj eldonoj (raportas Chuck SMITH, TEJO-estraro pri informado)

TEJO.org

Mi esploris uzantamikajn sistemojn kaj finfine decidis ke Drupalo plej taŭgos. Mi kopiis la enhavon de la malnova tejo.org kaj lanĉis ĝin. Poste mi aldonis blogojn kaj forumon, kiu bonas por havi retan komunumon por TEJO-anoj. Mi konstante aktualigas la paĝaron kaj tio ĉiam videblas de la ĉefa paĝo. Mi nuntempe esploras kiel plej bone multlingvigi la paĝaron.

Pasporta Servo (raportas Derk EDERVEEN, komisiito pri Pasporta Servo)

Pasporta Servo fidele aperadas. Eldono 2006 aperis kiel kutime en februaro, presita de eldonejo NEPO (Maciej WNUK) en Pollando. En 188 paĝoj vi trovos 1320 gastigantojn el 92 landoj, 23 mapojn, malfeliĉe neniujn anoncojn,



kaj novan Landan Organizanton en Bulgario.

Por tiu ĉi eldono la administra sistemo, kiu antaŭ dek jaroj estis programita de Jeroen BALKENENDE en LaTeX, estis reprogramita en Microsoft Word, por faciligi kaj plifleskebligi la administradon. Ni uzis la okazon por iom ŝanĝi la aspekton kaj la simbolojn, kio ŝparis pli ol 10% de la paĝoj.

La nombro de gastigantoj iomete malkreskis, sed la nombro de landoj kreskis al nova rekordo. Tamen, Pasporta Servo daŭre spertas malfacilaĵojn kaj problemojn:

– duono de la landoj havas nur unu ĝis tri gastigantoj, kaj duono de la gastigantoj loĝas en nur dek landoj

– Pasporta Servo estas deficitata, kvankam multaj gastigantoj ĉi-jare rezignis pri sia ‘senpaga’ ekzemplero, kaj kvankam multaj gastigantoj libervole donacis monon

– urĝe mankas persono kiu povus dediĉi iom da tempo al la ‘eksteraj rilatoj’ de Pasporta Servo, al pli aktiva vendado de la libro, kaj al enspezoj per donacoj, anoncoj ktp

Por 2007 ni planas la eblon de elektronika adreslibro por gastigantoj kiuj deziras tion, por tiumaniere ŝpari preskostojn kaj afrankojn. Pli da informoj vi trovos en la retejo de Pasporta Servo (www.tejo.org/ps).

Kontakto (*raportas Ĵenja AMIS, Kontakto-redaktorino*)

Aperintaj numeroj

En la dua duono de 2005 kaj la unua duono de 2006 en *Kontakto* aperis la jenaj numeroj:

- 207 (2005:3) – Ĉeftemo – Civilizacioj.
- 208 (2005:4) – Ĉeftemo – Terorismo.
- 209 (2005:5) – Ĉeftemo –

Politiko/malriĉeco.

- 210 (2005:6) – Ĉeftemo – Festoj.
- 211 (2006:1) – Ĉeftemo – Kie mitoj kaj realeco interplektiĝas.
- 212 (2006:2) – Ĉeftemo – Bestaj rajtoj (kun 4-folia aldonaĵo “KAKTO” rilata al la lando de la IJK 2006: Bosnio kaj Hercegovino).
- 213 (2006:3) – Ĉeftemo – Lingvoj.
- 214 (2006:4) – Ĉeftemo – Egalaj rajtoj/feminismo. En kunlaboro kun la kampanjo “Ĉiuj diversaj, ĉiuj egalaj” de la Konsilio de Eŭropo. Tiu ĉi numero estis sponsorita de la KdE.

Aperontaj numeroj

- 215-216 (2006:5-6) – Ĉeftemo – Tutmondiĝo/Amo
 - 217 (2007:1) – Ĉeftemo – Mitoj.
 - 218 (2007:2) – Ĉeftemo – Libero.
- (Temoj de la venontaj numeroj ankoraŭ ne estas strikte fiksitaj.)

Ĉiuj viaj ideoj, proponoj kaj (certe!) artikoloj ĉi-tamaj kaj ajnatemaj estas pli ol bonvenaj!

Kontakto ĉe Interreto

Ekde la jaro 2006 *Kontakto* estas havebla ankaŭ interrete, per la Reta Jarlibro de UEA (reto.uea.org, sekcio “Teko”), dank’ al laboro

de Andrej GRIGORJEVSKIJ. Tie la revuo aperas antaŭ la apero en la presita formo. Krom la freŝdataj numeroj, en la reto estas ankaŭ la jarkolektoj de 2005 kaj 2004 (en la taskolisto de la redakcio estas prepari kelkajn pliajn jarkolektojn por la reto). La freŝdataj numeroj de *Kontakto* estas plenkoloraj; post ĝia apero en la reto la redaktoro dissendas sciigon pri la haveblo de la nova numero al ĉiuj ricevantoj de *Kontakto*. La reta versio de *Kontakto* estas sufiĉe populara



(ekz., la numero kun la temo “Familioj” estis elŝutita pli ol 100-foje!). Chuck SMITH starigis sekcion kaj forumon de *Kontakto* ĉe la retpaĝo de TEJO kaj ankaŭ aĉetis la domajnon www.kontakto.org por posta starigo de memstara retpaĝo de *Kontakto*. La redaktoroj esperas ke la tasko krei retpaĝaron por *Kontakto* estos baldaŭ inter la prioritatoj de la estraro.

Interkulturo

En la raporta periodo, en *Kontakto* aperis du artikoloj rilate al la projekto Interkulturo (t.e. artikoloj rilataj al kultura diverseco, interkultura lernado, interkulturaj konfliktoj ktp.). La redakcio dankas al Interkulturo pro tiuj ĉi artikoloj (kiuj estas aparte ŝatataj de la legantoj) kaj invitas la kunlaborantojn de IK al plia kaj pli aktiva kunlaboro.

Fine de 2005 finiĝis komuna konkurso de Interkulturo kaj *Kontakto* pri la plej interesa interkultura sperto. Estis entute kvin gajntoj: tri de Interkulturo kaj du de *Kontakto*.

Kunlaboru!

La redakcio ankaŭ invitas la estraron de TEJO kaj ĉiujn aktivulojn kontribui kaj varbi kontribuojn por *Kontakto*. Ni tre bezonas, atendas kaj bonvenigas viajn kontribuojn!

TEJO Aktuale kaj TEJO Tutmonde

TEJO-Aktuale bedaŭrinde aperis sufiĉe malregule dum la lasta jaro. Pro tio ni nun serĉas novan redaktoron por *TEJO-Aktuale*.

TEJO Tutmonde – TT (Raportas Joel AMIS, TT-redaktoro)

En 2005 aperis ses numeroj de *TT*, kiuj ĉiuj

estis senditaj kun la revuo *Kontakto*. La redakcia adreso dum la tuta periodo estis en Atlanto, Usono.

Ĝis la dato de tiu ĉi raporto (la 4-a de septembro, 2006), estis redaktitaj kaj presitaj la unua kaj la dua-tria numeroj de *TT* (por konservi la sinsekvon de numeroj, la CO petis tion al la redakcio; la kvanto de la paĝoj en la numero 2-3 estis 16). Estas antaŭvidate ke en 2006 aperos du pliaj numeroj por kompletigi la jarkolekton kiu konsistos el 4 numeroj.

En junio la nuna redaktoro anoncis al la estraro (kaj poste en la revuo mem) ke li redaktos *TT*-on nur ĝis la fino de 2006. La ĉefa kialo de la demisio estas ke ege mankas tempo al la redaktoroj dediĉi sufiĉan tempon al la tasko.

Alia grava kialo estas manko de kontribuoj, aparte fare de la estraranoj – kaj ĝuste pro la tempomanko la

redaktoro ne povas tre aktive varbi por kontribuoj. La redak-


cio de *TT* – nuna kaj posta – tre bezonas kontribuojn kaj de la estraro kaj komitato (pro tio ke *TT* estas la oficiala organo), kaj de la membroj.

En numero 2-3 aperis anonco por nova redaktoro. La fruaj reagoj al tiu anonco estas tre esperigaj.

Rilatoj kun UEA (raportas Chuck SMITH, TEJO-estraro pri informado)

Jura sendependiĝo

Ni daŭrigas nian laboron kun UEA por ekhavi propran juran registronumeron en Nederlando. Ni nuntempe atendas ke Ans BAKKER fordonu la necesajn paperojn al la notario en Nederlando por ke ni ekhavu la juran sendependecon.





Nova TEJO-volontulino, Kasia MARCINIAK

Eksteraj Rilatoj (raportas Haris SUBAŜIĈ, TEJO-estrarano pri eksteraj rilatoj)

Partopreno en UN-konferenco en Novjorko (raportas Chuck SMITH, TEJO-estrarano pri informado)

Chuck SMITH kaj Anna-Laura WICKSTRÖM partoprenis UN-konferencon en Novjorko. Dum la konferenco ni multe babiladis kun aliaj partoprenantoj kaj estis trafitaj de pozitiva reago pri Esperanto de ĉiuj. Ni konatiĝis kaj kun aliaj gejunuloj, kaj reprezentantoj de grandaj kaj gravaj NRO-oj, kaj eĉ la vicprezidanto de la konferenco, kiu volas daŭrigi la diskuton. Pluraj petis de ni retadreson kaj planas viziti www.lernu.net.

Detala raporto: http://www.TEJO.org/vikio/Raporto_Pri_La_NRO_Konferenco_Ce_UN_2005

Partopreno en FoJE-konferenco en Vilno (raportas Chuck SMITH, TEJO-estrarano pri informado)

Mi ekhavis bonegajn kontaktojn kun Naciaj

Junularaj Konsilioj en Eŭropo kiuj volas ke naciaj junularaj E-organizoj aliĝu al ili. Mi ekenvolviĝis en la kampanjo Iĝu Vizebla (www.getvisible.org) kiu estas agado por ke junularaj aktivistoj ne devu akiri vizon por eksterlanda agado, kiu cetere ege utilis por havigi al ni TEJO-volontulojn. Mi ekhavis kontakton kun AEGEE en kiu ni povus instrui Esperanton ĉe ilia somera universitato venontjare. FoJE ankaŭ volas krei filmon pri sia dekjariĝo kaj ni povus traduki subtitolojn por ĝi Esperanten.

Detala raporto: http://www.TEJO.org/vikio/Raporto_Pri_Press_And_Communications_Meeting_Ce_FoJE_2006

Konkludo (raportas David-Emil WICKSTRÖM, prezidanto de TEJO kaj TEJO-estrarano pri IJK)

Fine mi ŝatus instigi vin ĉiujn ekaktivi en TEJO – TEJO estas **via** organizo kaj sen via kontribuo la agado de TEJO estas ege limigita

(la estraranoj ne estas superhomoj, bedaŭrinde...). Nuntempe TEJO tiel funkcias



agaj kaj faras kion ĝi volas. Feliĉe en Usono la kongreso ekaktivis kaj ekrepelis la dezirojn de BUSH kaj CHENEY. Ĉu la TEJO-komitato ankaŭ tion ĉi sukcesos?

Feliĉe (r)estas kelkaj aktivuloj kaj la estraro volas danki ĉiujn niajn aktivulojn por ilia (fakte via, se vi legas tiun ĉi raporton) kunlaboro dum la lasta jaro. Aparte ni volas danki al Osmo BULLER kaj ĉiujn oficistojn en la CO, niajn komisiitojn, redaktorojn kaj nian volontulon, Marteno MINICH.

Monda Kalendaro:

la Esperanto-Movado Flugrigarde

Komence de aprilo 2006 estis lanĉita Monda Kalendaro – ambicia malfermita projekto kiun Kataluna Esperanto-Junularo libere disponigas al ĉiuj, sed ĉefe al esperantistoj, por ke ĉiu povu facile publikigi siajn aktivaĵojn kaj informiĝi pri aktivaĵoj de la aliaj.

La nuna projekto fontas el la mankoj de kompleta Plena Kalendaro de Esperanto-Aranĝoj, bone prizorgata de multaj jaroj fare de Eventoj. Monda Kalendaro estas malfermita projekto en kiu ĉiuj povas libere anonci siajn aranĝojn, kaj kiu pli grafike bildigas ilin. La malfermiteco estas plifortigata de la fakto ke ĉiu povas anonci sin kiel kunredaktanton de la Monda Kalendaro en ties paĝo mem: la tasko konsistas nur el la akceptado de la ricevitaj novaĵoj kiujn oni filtras por eviti ret-rubaĵojn.

Tuj post la starto de la projekto, TEJO kaj la societo Varsovia Vento eksimpatiiis al la projekto kaj aldonis ĝin al siaj listoj de ligiloj. Ĝia internacieco plifortiĝas danke al tio

monda kalendaro



ke ĝi estas jam alirebla, krom en Esperanto, en la lingvoj angla, eŭska, hebrea, hispana, kataluna, korea, okcitana, pola kaj rusa.

Per tiu ĉi projekto KEJ deziras kontribui per guto al la komunaj streboj de la esperantistoj kaj montri ke ni ĉiuj batalas por la internacia frateco, la legitimeco de ĉiuj kulturoj kaj la defendo de ĉiuj lingvoj de la mondo. Maro estas gutaro.

Vizitu la paĝon www.mondakalendaro.org!

Joan CATALÀ

Esperanta Teatra Studio en Jalto, Ukrainio


La 23-an de septembro naskiĝis teatra Esperanto-studio – jalta filio de Esperanto-teatro. La studio ekzistas ĉe la jalta Esperanto-klubo “Tero” (en la studio lernas dek geesperantistoj), kaj ĝia gvidanto estas teatra reĝisoro A. V. Gent. La studado (senpaga) okazas dufoje semajne po kvar horoj. La studio anoncis al la urbanoj la eblon studi aktoran majstrecon de profesia teatra reĝisoro ĉe la studio.

La celo de la studio – reklamado kaj disvolviĝo de la Esperanto-movado kaj la Lingvo. En la repertuara plano estas klasikaj teatraĵoj de la monda dramaturgio kaj originalaj E-

teatraĵoj. Ni serĉas samideanojn, amikojn, mecenatojn kaj sponsorojn. Ĉi-cele en la reto estas kreitaj forumoj: www.teatr.3bb.ru (ruslingva) kaj www.teatro.5bb.ru (en Esperanto). Registritaj uzantoj de la forumoj havas pli da ebloj: redakti, komenci temojn, labori en la babilejo, interkorespondi sur paĝoj de la forumoj, partopreni temajn diskutojn kaj trovi samideanojn.

Jefim ZAJDMAN

TT Havas Novan Redaktoron!



La sekva TT-redaktoro – Marcos CRAMER – respondas la demandojn de Joel kaj Ĵenja.

- Saluton – kaj gratulojn pro via elektiĝo kiel TT-redaktoro! Vi loĝis en pluraj landoj – rakontu iom pri vi kaj via multkultura fono!

- Mi naskiĝis en Bonaero (Argentino) kiel infano de du germandevenaj argentinanoj. Kiam mi estis kvinjaraĝa, ni translokiĝis al Hamburgo en Germanio. Dekses-jaraĝe mi iris al Britio kun la intenco resti tie dum unu jaro por plibonigi mian anglan. Tamen, mi ŝanĝis miajn planojn, kaj finis la lernejon tie. Inter lernejo kaj universitato mi faris paŭzojaron, dum kiu mi estis kvin monatojn en Argentino, kaj ok monatojn en Tanzanio kiel kontraŭ-aidosa volontulo.

- Kion (kaj kie) vi studas? Kiom da lingvoj vi parolas?

- Mi studas matematikon kaj filozofion en Oksfordo, Britio. Mi parolas la germanan,

Esperanton, la anglan, la svahilan, la hispanan kaj Tokiponon (kaj mian propran planlingvon Loglio). Aldone, mi nun lernas la rusan. La germana kaj la hispana estas miaj denaskaj lingvoj, sed la hispanan mi ne parolas tiel bone kiel denaskulo, ĉar kvin-jaraĝe mi ĉesis uzi ĝin kaj devis poste relerni ĝin.

- Kiel (kaj kiam) vi esperantistiĝis?

- Mi trovis lernolibreton pri Esperanto ĉe kunloĝejano de mia frato en oktobro 2000, kaj tuj mia frato kaj mi kune eklernis la lingvon. Baldaŭ poste ni kune partoprenis en internaciaj Esperanto-aranĝoj. Bedaŭrinde mia frato nun ne plu uzas Esperanton.

- Vi partoprenis en multaj E-projektoj. Rakontu iom pri via Esperanta vivo kaj agado!

- Ekde januaro 2002 mi respondecas pri la retpaĝoj de la Germana Esperanto-Junularo (kun mallonga paŭzo en 2003). Ekde oktobro 2003 mi aktive kunlaboras en la Esperantlingva Vikipedio, kaj estas administranto tie ekde decembro 2005. Ekde aprilo 2004 mi foje verkis novaj-artikolojn por Ĝangalo. En la aŭtunoj de 2004, 2005 kaj 2006 mi ĉiam organizis Esperanto-kursojn por studentoj de mia universitato; bedaŭrinde en 2005 kaj 2006 neniu lernanto daŭrigis ĝis konversacia nivelo, sed eble ĉi-jare...

- Krom Esperanto, vi multe volontulis ankaŭ por kontraŭaidosa agado, kaj eĉ laboris en Tanzanio kiel instruisto, kadre de kontraŭaidosa kampanjo. Rakontu iom pri viaj aliaj volontulaj agadoj, ne ligitaj al Esperanto!

- De januaro ĝis septembro 2003 mi volontulis en Tanzanio pere de la brita volontula organizo SPW (*Student's Partnership Worldwide*) – Studenta Partnereco

Tutmonde). Post kvarsemajna trejnado pri la temo, mi instruis pri HIV/aidoso ĉefe al lernantoj de vilaĝa duagrada lernejo, sed ankaŭ al bazlernejoj kaj plenkreskaj vilaĝanoj. Tiu edukado tre gravas, ĉar en la tanzania socio daŭre ekzistas multaj malveraj kaj eĉ danĝeraj kredoj pri HIV/aidoso, ekzemple la kredo ke kondomoj enhavas la viruson HIV.

En somero 2005 mi denove volontulis en Tanzanio dum du monatoj. Ĉi-foje mi ne mem instruis pri HIV/aidoso, sed laboris en ŝtata oficejo kiu respondecas pri la disdono de financa subteno al malgrandaj kontraŭ-aidosaj organizoj.

Aldone, mi ĉi-somere volontulis en vendejo de juste komercitaj varoj en Leipzig en Germanio (la loĝloko de mia fianĉino), kaj espereble denove faros tion en venontaj ferioj.

1. Loĝloko: Oksfordo, Britio.
2. Aĝo: 22.
3. Profesio/studfako/vivokupo: Studas matematikon kaj filozofion.
4. Ĉefaj aktivajoj/interesoĵoj en la Movado: Vikipedio, retpaĝoj de la Germana Esperanto-Junularo, instruado.
5. Ŝatokupoj: Kuirado, legado, teniso, Esperanto kaj mia propra planlingvo Loglio.
6. Kion vi volas atingi dum via oficperiodo: Mi volas ke *TEJO Tutmonde* daŭre restu valora legaĵo por ĉiuj aktivuloj de la junulara Esperanto-movado. Por tio mi certigos ke ĝi enhavu artikolojn pri la plej diversaj projektoj, kun aparta emfazo je novaj, promesplenaj iniciatoj. Kaj kompreneble mi volas certigi ke ĝi daŭre uzu seneraran kaj bonstilan Esperanton.
7. Vivdevizo: Faru bonon.


Nova Komitatano A por KEJ Prezentas Sin

Joan CATALÀ, Kataluna Esperanto-Junularo

1. Loĝloko: Mi naskiĝis en la urbo Valencio, Katalunaj Landoj.
2. Aĝo: Ĉiun 12-an de januaro mi renaskiĝas denove.
3. Profesio/studfako/vivokupo: Mi estas komputilisto por mia regiona administracio kaj faras komputil-programojn, TTT-paĝojn por la urbodomoj kaj solvas teknikajn problemojn de aliaj laboristoj de nia valencia administracio.
4. Ĉefaj aktivajoj/interesoĵoj en la Movado: Mia ĉefa intereso estas uzi Esperanton libere kun geamikoj aŭ konatoj. Mi ne celas ke ĉiuj parolu ĝin, sed ĝi almenaŭ ne estu persekutata, danĝera lingvo.
5. Ŝatokupoj: Mi interesiĝas pri kontraŭmilitistaj revolucioj en la mondo, kaj ankaŭ mi vere ne komprenas kial la homaro ĉiam

ripetas la samajn erarojn, jaron post jaro, jarcenton post jarcento. Paco, demokratio kaj respekto inter la popoloj estas la sola solvo por ne mortigi la gefratojn de aliaj lokoj.

6. Kion vi volas atingi dum via oficperiodo: Mi volas lerni/kreski/progresi kun TEJO. Unue mi malfermas la okulojn, poste mi opinias kaj finfine mi helpas kaj partoprenas. Mi rimarkis en la IJK-2006 ke en TEJO partoprenas tre interesaj homoj.
7. Vivdevizo: Ni ne atendu la estontecon, la estonteco estas ni.



Indymedia:

jam pli ol du jarojn en Esperanto!

La Esperanto-eldono de la alternativa sendependa novaĵ-retejo Indymedia Barcelono (http://barcelona.indymedia.org/?lang=eo_EO) dujariĝis la 25-an de novembro, 2006.

Ĝi estis aprobata la 9-an de septembro 2004 de la asembleo de *Indymedia Barcelona*, kaj post du monatoj kaj duono da streĉa laboro, ĝi estis lanĉita la sekvan 25-an de novembro kaj fariĝis unu el la ĉefaj inform-projektoj de Kataluna Esperanto-Asocio por diskonigi kaj normaligi la uzon de Esperanto en la lokaj neesperantistaj medioj.

Indymedia estas granda reto prizorgata de grupoj en la tuta mondo kaj organizata per retlistoj kaj asembleoj. La projekto *Indymedia* naskiĝis okaze de la manifestacioj kontraŭ la kunveno de la Monda Organizaĵo pri Komerco en Seatlo en 1999. La informcentro aranĝita tie funkciis kiel renkontiĝejo, kie ĵurnalistoj povis trovi informojn kaj/aŭ publikigi siajn proprajn. Unu jaron poste, en kunveno en la okupita domo *Espai Obert* (Malfermita Loko) en Barcelono oni decidis krei *Indymedia-n Barcelono*, danke al la laboroj de aliaj *Indymedia*-centroj kaj al volontula laboro. Ĝi fariĝis la unua centro funkcia en Eŭropo. De tiam, *Indymedia Barcelona* kreskis ĝis kiam ĝi fariĝis tio kio ĝi estas nun: libera kaj kolektiva loko kiu permesas ke esprimu sin individuoj, socialaj movadoj kaj ĉiuj organizoj sen eblecoj aliri la amaskomunikilojn. Sur tiu bazo, la asembleo de *Indymedia Barcelona* decidis en septembro 2004 prezenti Esperanton kiel novan lingvan eblon por legi la ĉefartikolojn. Per Esperanto ĝi “celas kontribui al pli justa mondo, en kiu neniu, pro naskiĝo aŭ ekonomia nivelo, havu pli da eblecoj scipovi la superre-

gantajn lingvojn; t.e. ĝi celas eviti diskriminacion pro lingvaj kialoj”. Per tio Esperanto prezentiĝas samnivele apud la kataluna, la hispana kaj la angla.

Ankaŭ du aliaj *Indymedia*-eldonejoj havas Esperanto-eldonojn: la brazila, kiu pioniris (<http://www.midiaindependente.org/eo/blue>), kaj, en multe malpli alta grado, la poste aperinta belorusa (<http://belarus.indymedia.org>).

Dum tiuj du jaroj en Esperanton estis regule tradukitaj ĉiuj ĉefartikoloj – entute pli ol 200 – fare de plurkapa skipo en kiu nuntempe aktivas

ĉefe Joan CATALÀ, Jomo MILLA kaj Miquel GÓMEZ.

Temas pri postulema tasko, ne nur ĉar traduki malfacilas, kaj eĉ pli de la propra nacia lingvo en Esperanton ol inverse, sed ankaŭ ĉar la sociala enhavo, ne kutima en Esperanto-medioj, postulis la evoluigon de specifa terminaro, kreata de la kunlaborantoj mem.

Danke al ĝi, kaj al la formika laboro de la laboroteamo, ĉ. 500


terminoj, kiaj “kontraŭtumulta policano”, “seksa sieĝo en la laborejo” aŭ “kaserol-protesto” fariĝis kutimaj por la regulaj legantoj de *Indymedia Barcelono*.

Kataluna Esperanto-Asocio,

perita de Joan CATALÀ

Kontakt-adreso de la laboroteamo:

vilaweb_red@yahoogroups.com



tejo

63a IJK



TEMO:

PACO, KUNLABORO KAJ DISVOLVIĜO

VJETNAMIO

HANOJO

(27.07 - 03.08.2007)

BONVENON AL HANOJO - VJETNAMIO

KIAL HANOJO?

HANOJO ESTAS LA ĈEFURBO DE VJETNAMIO, TROVIĜAS EN LA NORDO DE LA LANDO. ĜI ESTAS CENTRO DE EKONOMIO, POLITIKO KAJ KULTURO. EN 1999, HANOJO ESTIS HONORIGITA DE UNESKO: URBO DE PACO. SAMKIEL ALIAJ ĈEFURBOJ, HANOJO ESTAS CENTRO DE DIVERSAJ BELAJ VIDINDAĴOJ: LAGOJ, MUZEOJ, PARKOJ, ZOOLOGIAJ ĜARDENOJ KAJ MAŬZOLEO DE LA MONDA FAMKONATA PREZIDENTO HO CHI MINH. TURISTOJ POVAS FACILE TURISMI EN KAJ EKSTER LA URBO PER PUBLIKAJ VETURILOJ. DE HANOJO, VI POVAS FACILE VIZITI HALONG-GOLFON, FAMKONATAN MONDAN HEREDAĴON, 170 KM FOR DE HANOJO; KAJ DUM LA IJK NI ORGANIZOS KOMUNAN EKSKURSON AL LA GOLFO HALONG.

LA TEMO - PACO, KUNLABORO KAJ DISVOLVIĜO

- 😊 ROLO DE INTERNACIA LINGVO KIEL ESPERANTO DUM PROTEKTADO DE MONDA PACO
- 😊 KION KAJ KIEL FARI POR DISVASTIGI UZON DE ESPERANTO KIEL KOMUNA LINGVO EN LA MONDO?
- 😊 KION FARI POR UTILIGI LA LINGVON EN DIVERSAJ ASPEKTOJ DE LA VIVO?
- 😊 IDEOJ KAJ KUNLABORPROPONOJ INTER ORGANIZAĴOJ, INDIVIDUOJ ESPERANTISTAJ

KIU ESTAS VEJO?

VEJO ESTAS LA NOVA ORGANIZO DE VJETNAMA ESPERANTISTA JUNULARO KAJ ANKAŬ LA PLEJ FREŜA LANDA SEKCIO DE TEJO (LA 44a LANDA SEKCIO). NIA ORGANIZO LANDSEKCIIGIS 63a IJK CELANTE KONTRIBUI AL DISVOLVIĜO DE NIA JUNULARA MOVADO DE ESPERANTO KAJ PLILARĜIGI SOLIDARECON, AMIKECON, KUNLABORON SURBAZE DE RECIPROKA KOMPRENADO INTER JUNA ESPERANTISTARO. LA 63a IJK ESTOS GRANDA EVENTO POR LA VJETNAMA JUNULARA MOVADO KAJ CERTE ĜI MARKOS ĜIAN MATURECON KAJ FLORIĜADON.

MANĜADO

SURLOKE, MANĜOJ (kiel Chả Cá, Nem, Phở,...-vjetnamaj manĝaĵoj) ESTAS TRE BONGUSTAJ, MALMULTEKOSTAJ KAJ ĈIETROVEBLAJ.

LOĜEJO

LA LOĜEJO ESTAS KOMFORTA, ĈAMBROJ ESTAS EN NOVA STUDENTA GASTEJO DE LA UNIVERSITATO, KIU SITUAS TUJ APUD LA KONGRESEJO, KUN 8 LITOJ, DUŜEJO, NECESEJOJ. ĈIRKAŬ LA UNIVERSITATO TROVIĜAS MULTAJ BAZAROJ, SUPERBAZAROJ, MANĜEJOJ, DRINKEJOJ KAJ VENDEJOJ DE ĈIUJ AĴOJ KAJ ANKAŬ MULTAJ GRANDAJ KAJ MALGRANDAJ HOTELOJ.

NOTU: MEMZORGANTOJ MEM DEVAS TROVI LOĜEJON

Kotiztabelo (en EŬROJ)

Aĝo	A-LANDANOJ	B-LANDANOJ	C-LANDANOJ
< 20	25	20	10
20 - 30	35	30	15
30 +	65	55	35
ANTAŬPAGO	20	20	10

* Ĉinoj povas pagi surloke per **yuan**. Tamen, ĉinoj devas antaŭpagi laŭ regulo de kongreso.

Landkategorioj:

A: EU-landoj (sen la novaliĝintaj kaj Grekio), Japanio, Kanado, Monako, Norvegio, San-Marino, Svislando, Vatikano, Usono, Aŭstralio, Nov-Zelando, Israelo, Islando

B: Andoro, Ĉeĥio, Estonio, Grekio, Hungario, Kroatio, Malto, Latvio, Litovio, Pollando, Slovakio, Slovenio

C: Ĉiuj aliaj landoj

Rabato: se vi aliĝos ĝis la 3-a de januaro 2007, vi ricevos rabaton de 10 eŭroj.

Malrabato: se vi aliĝos post la 30-a de aprilo 2007, vi pagos 10 eŭrojn pli ol en la tabelo.

Surloka malrabato: se vi ne estas individua membro (aŭ patrono) de TEJO aŭ UEA, en la kategorio pli alta ol MG, vi krompagas 30 eŭrojn. Tiuj, kiuj bezonas invitleteron, krompagas 10 eŭrojn.

Manĝaĵoj:

La prezo de manĝaĵoj por tuta semajno (3 manĝoj tage) estas 35€ (ne inkluzive manĝaĵojn de la ekskursita tago). Memzorgantoj ankaŭ povas mendi manĝaĵojn ĉi tie. Troviĝas ankaŭ manĝaĵoj por vegetaranoj aŭ vegananoj.

Loĝejo:

La prezo de loĝejoj estas 35€ por persono por tuta semajno.

Ekskurso:

- **D1**☐: duontaga ekskurso al Maŭzoleo de la prezidento Ho Chi Minh + lia muzeo + armea muzeo: 7€
 - **D2**☐: duontaga ekskurso al etnologia muzeo + templo de literaturo + arta muzeo: 7€
 - **T**☐: Tuttaga ekskurso al la golfo Ha Long monda famkonata heredaĵo: 15€
- La prezoj inkluzivas veturilojn, turismajn ĉiĉeronojn, biletojn, trinkaĵojn (kaj manĝaĵojn por la tuttaga ekskurso)

ALIĜILO POR LA 63-a IJK 2007

PERSONA NOMO _____

FAMILIA NOMO _____

NASKIĜDATO _____ LANDO _____

ADRESO _____

URBO _____ POŝTKODO _____

UEA-KODO _____ TELEFONO _____

MI DEZIRAS RICEVI INFORMOJN RETPOŝTE RETADRESO _____

INO MALINO VEGETARANO ĜIOMANĜANTO

MANGOS MEMZORGE

PARTOPRENTEMPO (SE NE LA TUTO): DE LA _____ ĜIS LA _____

MI SENDOS LA ANTAŬPAGON ĜIS LA _____ PER _____

RESTADO: STUDENTA GASTEJO SUR LITO MEMZORGANTO

MI ŜATUS LOĜI KUN: _____

EKSKURSO: D1 D2 T

MI KONTRIBUAS AL LA PROGRAMO PER _____

MI BEZONAS INVITILETERON (*Limdato por peti invitleteron estas la 1-a de majo 2007*)

SE VI BEZONAS VIZON - PLENIGI! PASPORTA NUMERO _____

PASPORTO VALIDA EKDE _____ PASPORTO VALIDA ĜIS _____

LABOR- / STUD-LOKO (kun adreso kaj telefono) _____

MI SENDAS LA FOTOKOPION DE LA PASPORT-PAĜO KUN FOTO

KONDIĈOJ:

LA KOTIZOJ ENHAVAS NENIAN ASEKURON KAJ NE INKLUZIVAS EKSKURSOJN. VIA ALIĜO EKVALIDAS, KIAM LA LKK RICEVAS LA ANTAŬPAGON KAJ PLENIGITAN ALIĜILON. LA ALIĜPERIODO ESTAS KALKULATA LAŬ LA SENDODATO DE LA KOTIZO. POR KALKULI LA KOTIZON VALIDAS VIA AĜO LA 27-AN DE JULIO 2007. SE VI BEZONAS INVITILETERON, VI DEVAS KROMPAGI 10 EŬROJN. LA KOTIZO ESTAS TRANSDONEBLA AL ALIA PERSONO SED NE REDONEBLA. SE VI HAVAS PROBLEMON PRI ANTAŬPAGO, VI DEVAS INFORMI NIN PRI TIO PER LA RETADRESO: ijk@tejo.org

MI konsentas kun la prezentitaj kondiĉoj kaj aliĝas al la 63-a IJK 2007

Subskribo: _____ Dato: _____

Antaŭpagon sendu: al UEA-konto: ijk-b (kun indiko IJK 2007, http://www.uea.org/alighoj/pag_manieroj.html)

aŭ al LKK-konto: 001.1.37.0320131 (Bank for foreign trade of Vietnam)

Adresoj:

poŝta adreso de LKK:

LAI THI HAI LY
301 Giang Vo, Cat Linh,
Dong Da, Ha Noi,
Viet Nam

Ĝenerala retadreso de LKK: ijk@tejo.org

Por specifaj celoj bonvolu uzi jenajn retadresojn:

aliĝilo: ijk.alighilo@tejo.org

programkontribuantoj: ijk.programo@tejo.org

invitleteroj por ekhavi vizon: ijk.vizoj@tejo.org

<http://www.tejo.org/ijk>



10-an de oktobro, 2006

Calle Alejandro Rodríguez
edifício, bloque 3, apto 5
Florida, Camagüey, Kubo
CU-72810

Saluton, samideanoj!

Mi bondeziras vin kaj la tutan TEJO-anaron.

Antaŭ ĉio mi volas prezenti min. Mi nomiĝas Andy Hernández Martínez kaj mi estas instruisto pri historio kaj politiko (mi estas preskaŭ 21-jaraĝa).

Dank' al mia onklino mi eksciis pri Esperanto, kaj poste ŝi instruis ĝin al mi en 2000. Ekde tiam mi estas aktiva en mia landa asocio de UEA, kaj mi ankaŭ disvastigas la Internacian Lingvon inter neesperantistoj, ĉefe gejunuloj.

La plej freŝdata nia atingo estas la okazonta E-kurso per televido en mia vilaĝo. Ĝin organizos Florida E-klubo kun la helpo de la Kuba E-Asocio (KEA). Ni ankaŭ elsendas pri/en Esperanto 15-minutan programeton ĉe Radio Florida.

Sed por mi la plej sukcesa junulara atingo estos E-kurso en mia lernejo, kie miaj gelerntoj multe instigas min instrui la lingvon. Ili estas ĉ. 30 gejunuloj, krom gelerntoj el aliaj klasoj, kiuj ankaŭ interesiĝas.

Kiel vi povas legi, nia junulara E-movado estas kreskanta, sed, bedaŭrinde, ni havas malfacilaĵon: ĉefe, informado. En Kubo oni ne scias, kio estas interreto (eĉ mi mem!). Nur

membroj (ne ĉiuj) de turismaj kompanioj aŭ de la Kuba Komunisma Partio [povas uzi ĝin]. Mi pensas, ke TEJO Tutmonde povos multe helpi nin, ĉar ĝi montras ke multaj aliaj aranĝoj okazas per/en Esperanto, kaj ke ankaŭ gejunuloj parolas ĝin.

Ekde januaro mi estis elektita de la Nacia Komitato de KEA kiel "reorganizanto" de la t.n. Junulara Sekcio de Kuba E-Asocio (JoSoKEA) kiu por longa tempo malaperis. Tial ni petas korespondadon (se eblas) kun la ekstera mondo. Mi scias pri TEJO Tutmonde danke al s-ro Julián Angulo, prezidanto de KEA, kiu donacis al mi (dum E-aranĝo) tri numerojn de TT de la jaro 2005 (numeroj 110, 113 kaj 114). Mi scias ke eble vi ne povos, sed mi nur deziras sciigi vin, ke jam nova Kuba E-Junularo ekzistas, kaj ke ĝi estas entuziasma, talenta kaj vigla. Inter tiaj membroj estas verkistoj, kantistino, deklamistinoj, prelegistoj ktp., kiuj plezurigas la esperantistojn en Kubo dum lokaj kaj naciaj eventoj. Kelkaj el ni povas kontribui al TEJO Tutmonde (kelkaj havas retroŝton, mi ne).

Amike,
Andy HERNÁNDEZ MARTÍNEZ

Noto de la redakcio:

La TT-redakcio sendis al Andy HERNÁNDEZ MARTÍNEZ respondon, kun kelkaj numeroj de TT kaj Kontakto, kaj UEA jam membrigis Andy-n en TEJO pere de la fondajo Canuto. Sed ni invitas ĉiujn TEJO-anojn starigi kontaktojn kun aliaj E-Asocioj (aparte en la lokoj kun malfacila ret-aliro, kiel Kubo) – kaj ankaŭ kontribui al la fondajo Canuto de UEA, per kiu eblas senpage membrigi en TEJO/UEA talentajn kaj aktivajn samideanojn el malriĉaj landoj.

Pedibus Calcantibus en Odeso



Marino sur la korvilo de Juna Amiko

Eble vi jam legis pri Marino CURNIS – 33-jaraĝa itala esperantisto, mondvojaĝanto, verkisto, pentristo, muzikisto kaj simple agrabla homo, kiu en januaro 2006 komencis longan kaj nekutiman vojaĝon *Eurasia Pedibus Calcantibus**: ene de kvin jaroj li planas trairi perpiede (!) la tutan Eŭropon kaj Azion. Kiam li gastis en Odeso, Ukrainio, gvidantino de Junulara Esperanto-Klubo “Verdaĵo” Tatjana AUDERSKAJA profitis la okazon intervjui Marinon. Kaj jen la rezultoj!

- *Kio interesa okazis dum via vojaĝo?*

- Multaj interesaj aferoj okazas eĉ dum unu tago. Do imagu – se temas pri kvinjara vojaĝo! Post ses monatoj de la komenco de

Eurasia Pedibus Calcantibus mi povus rakonti mil anekdotojn. Tamen, mi invitas vin vojaĝi, konatiĝi kaj sperti mem interesajn, nekutimajn kaj amuzajn situaciojn. Kaj se vi ne havas la eblon renkonti eĉ viajn najbarojn, tiam mi invitas vin legi kelkajn miajn anekdotojn rete: www.eurasiapc.com kaj <http://epc.vagabondo.net>. Eble vi havos alian elekton: fakte mi esperas eldoni ĉiujare po libro, komence en la itala lingvo, kaj poste traduki ilin Esperanten kaj eldoni.

- *Ĉu ofte okazis miskomprenoj?*

- Feliĉe ne. Lingvajn miskomprenojn mi povas eviti pro miaj konoj de diversaj lingvoj kiuj helpas al mi eĉ kiam mi tute ne konas la lokan lingvon. Kulturajn miskomprenojn mi evitas, ne pretendante koni multe pri loka kulturo. Kaj se miskompreno okazas, mi pardonpetas!

- *Kiel helpis Esperanto dum via vojaĝo?*

Ĉu ofte troviĝas esperantistoj survoje?

- Vi scias: bedaŭrinde, esperantistoj ne estas multaj. Tamen multaj el ili gastigis/as/os min (koran dankon!), kaj pere de ili mi malkovradas Esperantan vivon kaj ilian urbon aŭ nacion. Bedaŭrinde, mi ne povas renkonti multajn aliajn esperantistojn kiuj loĝas malproksime de mia itinero. Tamen mi certas ke Esperanto estas taŭga lingvo por interkompreno, kaj mi daŭre diskonigas ĝin kiam eblas.

- *Ĉu malfacilas ĉiam piediri? Ĉu ne estas iam tento en trajniĝi?*

- Jes, malfacilas ĉiam piediri, ĉar nia vivmaniero ne permesas tion. Do, ni ne havas taŭgajn stratojn, nur stratojn por veturi. Kaj ankaŭ la korpo bezonas halti. Tial mi faras kelkajn paŭzojn, por ripozi kaj verki la libro-

jn pri la vojaĝo.

- *Kiom da aĵoj vi portas? Ĉu ĉio bezonatas? Ĉu ĉio sufiĉas?*

- Nune mi kunportas preskaŭ 40 kg, 14-15 el ili estas mia speciala “ĉaro” Rocinante**. Tamen, tagon post tago mi lernadas kio estas bezonata aŭ sufiĉa.

- *Kiel vi trovas tranoktejojn?*

- Kiam mi eksentas ke mia korpo estas laca, mi decidas kiom da tempo aŭ kilometrojn daŭrigi. Tiam certe kaj “hazarde” (nenio ja estas hazarda!) mi trovas tranoktejon. Foje estas loko por mia tendo, foje estas nova amiko. Mi havas ankaŭ adresojn el “Pasporta Servo” kaj aliajn similajn listojn.

- *Kie vi manĝas? Kie vi aĉetas manĝaĵojn? Ĉu ofte vi kuiras mem? Se jes – do kion kaj kie?*

- Mi precipe aĉetas manĝaĵojn en vendejoj. Se mi povas kiuri mem, mi aĉetas manĝaĵojn “kvazaŭ-italajn”, ĉar mia organismo al kutimiĝis al ili kaj kelkfoje ili necesas. Se mi ne povas fari tion, mi aĉetas kion la vendejo proponas por rapida manĝo, ekz., pano kun fromaĝo. Tamen, kiam mi havas ŝancon gustumi lokajn manĝaĵojn, mi faras tion tre plezure. Krome, mi notas receptojn de bongustegaj (laŭ mi) manĝaĵoj kiuj plej plaĉis al mi.

- *Kiom da ŝuoj vi eluzis? Kie vi lavas vestaĵojn?*

- Feliĉe, mi ne havas problemojn pri ŝuoj, ĉar mi havas du sponsorojn: itala firmao *Crispi* donadas al mi ŝuojn *Monaco*, kiujn mi uzas precipe vintre, kaj alia itala firmao, *Lizard*, donadas al mi sandalojn, kiujn mi uzas ĉefe somere. Ankaŭ pri vestaĵoj mi havas sponsorojn: *Coolmax* kaj *Thermolite*, hispan-turka firmao, kaj *TRR*, itala. Tamen, vi pravas, mi devas lavi de tempo al tempo. Mi faras tion kiam eblas en domoj aŭ hoteletoj, aŭ... fontanoj.



Marino (meze) en Nepalo, 2001

Noto de la intervjuisto: Vere Marino havas tre interesajn sandalojn, kiuj allogis atenton de ĉiuj ĵurnalistoj en Odeso. Ili estas tre molaj sandaloj, faritaj kiel gantoj – kun aparta ujo por ĉiu piedfingro. Marino diris ke ili estas tre oportunaj por urboj.

- *Kio estos la rezulto de via grandvojaĝo?*

- Mi ne scias mian estontecon (ridetas), do, mi povas nur imagi ĝin. Espereble, mi atingos pli grandan kulturon rilate al nia Planedo kaj al ĝiaj loĝantoj. Mi konos kaj scios multe pli. Mi havos pli grandan horizonton pri mia vivo kaj vivo de la aliaj. Kaj mi esperas por mi mem ricevi sufiĉan famon, por ke mi povu vivi (gajni sufiĉe da mono) per mia arto: poezio, muziko, pentrado ktp. Eble denove vojaĝi kaj samtempe daŭrigi paroli al la mondo pri beleco kaj boneco de malsamaj kulturoj, pri paco kaj pri... Esperanto (ride-tas). Tamen, kiel oni diras en Turkio kaj aliaj lokoj: “Inŝallah” – “Se plaĉos al dio”.

* *Pedibus Calcantibus* – (de la latina) “per piedoj kiuj premas” [la teron].

** Rocinante [rosinante] – la ĉevalo de Donkiĥoto.

Piratado kaj Sabotado de Esperanto-Muziko

De pli-malpli tri jaroj muziko suferas sufiĉe akran krizon en la mondo pro la diverseco de novaj teknologioj kiuj evoluas fulmrapide (interreto, MP3, Podkasto ktp.), kaj al tio aldoniĝas senbrida KD-kopio helpo de la pli kaj pli granda disvastigado de personaj komputiloj. La disko-industrio nur povas konstati drastan disfalon de siaj vendoj, KD-fabrikejoj fermiĝas kaj maldungas sian personaron. La krizo estas grava. Kelkaj eldonejoj provas trovi alternativojn vendante unuopajn muzikaĵojn interrete, aŭ eĉ bandoj provas aperigi siajn albumojn ne plu sur KD-oj sed sur USB ŝlosiloj – sed vere neniu scias kion fari kaj kio okazos al muziko en la venontaj jaroj.

Esperantaj muzikeldonejoj havas tute similajn problemojn kiel malgrandaj muzikeldonejoj ĝenerale, sed la konsekvencoj por ni estas tamen multe pli gravaj: por Esperanto-muziko la problemoj estas dekobligitaj kompare al la la muziko en aliaj lingvoj. Konatas ke Esperantaj muzikeldonejoj malmultas. Unu el la ĉefaj, Vinilkosmo, jam delonge lanĉis atentigon pri la rapida evoluo de la aktualaj teknikoj kaj pri la danĝero de kopiado de diskoj kaj de elŝutado de muziko el la interreto.

La tuj sentebla konsekvenco estas la falo de la diskovendoj kaj samtempe la kresko de muzikelŝutado senpage el la interreto: la artistoj kaj muzikeldonejoj (Vinilkosmo, MusicExpress ktp.) disponigas libere du-tri muzikaĵojn de ĉiu albumo varbcele en la interreto. Kulpas pri tiu fenomeno ankaŭ la popularigo de hejmaj komputiloj kiuj ebligas facilan elŝutadon kaj kopiadon de KD-oj.

Eldoni muzikon ne estas simple preni la muzikon de disko kaj meti ĝin enreten... Eldoni muzikon estas grandega laboro unue inter la artistoj kiuj elpensas ĝin, verkas, komponas kaj poste ludas, kantas kaj registras la muzikon... Por kelkaj artistoj tio postulas jarojn da senĉesaj streboj kaj sinoferoj. Poste la eldonejo kunlaboras kun la artisto por produkti, eldoni kaj distribui la artajn verkojn... kaj zorgi pri la “komerca” flanko de la muziko.

Tiu komerca flanko estas la produktado kaj eldonado de muzikoj de artistoj, kaj ĝi kostegas. Nur dank’ al la vendado de la eldonitaj diskoj eblas daŭrigi la produktadon kaj eldonadon de novaj diskoj. Tiel mono investita en muzikon povas esti reinvestita por novaj produktaĵoj.

Por havi la ideon kiom kostas produkti kaj eldoni diskon jen kiel estas dispartigitaj la produkto- kaj eldonkostoj por, ekzemple, unu el la lastaj eldonoj de Vinilkosmo. Temas pri eldono de 1000 ekzempleroj, kaj la tuta produktokosto estas 9880 EUR:

Suma prezo por unu KD:	15,05 EUR sen impostoj (vendoprezo al la publiko)
Surbendigaj kostoj:	4,65 EUR
Mastrumado:	1,07 EUR
Grafika laboro:	1,01 EUR
Aŭtoraj rajtoj:	1,06 EUR
Presado:	1,57 EUR
Varbado:	1,63 EUR
Tantiemoj:	0,92 EUR
Administrado/Stokado:	2,00 EUR
Profito:	1,15 EUR

Suma prezo por unu KD: 12,40 EUR sen impostoj (vendoprezo al la libroservoj kaj revendistoj)

Surbendigaj kostoj:	4,65 EUR
Mastrumado:	1,07 EUR
Grafika laboro:	1,01 EUR
Aŭtoraj rajtoj:	1,06 EUR
Presado:	1,57 EUR
Varbado:	1,63 EUR
Tantiemoj:	0,92 EUR
Administrado/Stokado:	0,49 EUR
Profito:	0,00 EUR

Plej malbona la situacio estas en la disvolvigantaj landoj, kiel landoj de Sud-Ameriko kaj Azio (kaj ankaŭ Afriko kaj Orienta Eŭropo – Red.), por kiuj Esperanta muziko ne estas alirebla pro la altaj prezoj de la Eŭrope eldonitaj Esperanto-diskoj.

Por provi ŝanĝi tion, Vinilkosmo provis trovi solvojn kreante partneran eldonadon kun BEL (Brazila Esperanto-Ligo) por disponigi la Vinilkosmajn eldonaĵojn en Sud-Ameriko, sed, bedaŭrinde, ĝis nun sensukcese. Nun estas nova projekto starigi partneran eldonadon kun la nova strukturo, Kosmuzik en Brazilo. Sed organizi tion postulas iom da tempo kaj ĉefe mono. Dume la situacio malpliboniĝas...

Vinilkosmo ekspertis novan fenomenon: piratado de siaj eldonoj fare de retpaĝoj, ekzemple blogoj. Unua kiu tiel agis estis bazita en Argentino kaj tute kontraŭleĝe disponigis por libera elŭtado ses albumojn eldonitajn de Vinilkosmo kaj unu eldonitan de BEL. Tio estas tutsimple senskrupula

ŝtela misago kaj ĝi sabotadas la laboron por Esperanto-muziko kiun la artistoj kaj la eldonejoj strebas fari.

Artistoj kaj muzikeldonejoj estas intime ligitaj kaj funkcias kune, ĉar ili helpas unu la alian kaj ili bezonas unu la alian. La muziko de eldonitaj diskaj apartenas al la artistoj, kaj neniu rajtas uzi ilin por publika disvastigo krom se estas interkonsento kun la artisto/eldonejo. Estas klare ke ne eblas fari kion ajn pere de muziko kiu apartenas al artistoj, kaj certe ne eblas disponigi ĝin senpage al la publiko, sen peti la permeson de la artistoj - kaj des pli kiam la diskaj estas vendataj.

Kiel vi vidis, produkti diskajn kostegas al la artistoj kaj al la eldonejo amason da horoj da laboro kaj grandajn investojn de tempo, sindonemo, pasio kaj mono.

Esperanto-muziko estas unu el la plej vivantaj partoj de Esperanto-kulturo. La

eldonejoj strebas teni ekvilibron por daŭre alporti al la Esperanto-Movado kaj al Esperanto-kulturo konstantan fluon de novaj eldonaĵoj, de novaj artistoj ktp. Piratado (ŝtelado de muziko) frakasas tiun laboron kaj povas en tre malmulte da tempo dronigi la eldonejon... Ĝi rompas la ekvilibron de la eldonejoj kaj

endanĝerigas tiom la eldonejojn kiom la artistojn kaj eĉ la muzikan kulturon mem... Tial pro piratado post kelkaj jaroj eĉ la Esperanta kulturo povos rapide suferi, malriĉiĝi kaj kadukiĝi.

Feliĉe, ĉi-foje la artistoj, Vinilkosmo kaj ĝiaj kunlaborantoj sukcesis argumenti kaj



konvinki la piratan blogiston ĉesi tiun sabotadon. Sed en alia kazo la eldonejo estus devigata interrompi sian aktivadon kaj prokrasti aŭ forlasi siajn projektojn kaj produktaĵojn en preparo por eviti bankrotecon...

Neniu eldonisto prenas senkonsiderajn riskojn eldonante diskojn sen esti certa ke eblas disvendi ilin. Neniu Esperanta eldonejo havas la financajn rimedojn por riski fiaskon pro mallojala konkurenco fare de piratoj.

Kiam la eldonejoj ĉesos produkti novan muzikon kaj ne plu reeldonos elĉerpitajn diskojn, la piratoj malaperos ĉar ili nenion plu povos pirati, sed certe tiam jam tro malfruos. Iel dubindas ke piratoj ekproduktos Esperanto-muzikon por disdoni ĝin senpage interrete.

Espreble, la situacio evoluos rapide, kaj la piratoj ĉesos aktivi kontraŭ profesie eldonita Esperanto-muziko antaŭ ol estos tro malfrue, kaj Esperanto-muziko fariĝos dezerto... Sed estu ankaŭ ege klare ke esperantisto kiu elŝutas piratitan muzikon fariĝas komplico kaj

respondecas pri la mortigo de Esperanto-kulturo kaj kontribuas al ĝia entombigo.

Nura subteno ebla estas per akiro de la originalaj diskoj eldonitaj kaj disponigitaj en la libroservoj aŭ rekte ĉe la eldonejoj. Varbcele estas libere disponebla muziko de ĉiuj albumoj kaj informojn pri la artistoj ĉe <http://www.musicexpress.com.br/novajoj.asp> kaj muzikvideoj ĉe <http://farbskatol.net/>.

Ĝeneralaj informoj pri Esperanto-muziko haveblas en la TTT-ejo de EUROKKA <http://artista.ikso.net/eurokka/> kaj pri la artistoj <http://artista.ikso.net/>.

Fine, Vinilkosmo havas sian propran retejon kie eblas rekte aĉeti diskojn enrete. Vizitu ĝin ĉe www.vinilkosmo.com.

Kompilita de Flo! (Floréal MARTORELL) laŭ argumentoj okaze de la diskuto inter artistoj kaj aktivuloj de EUROKKA/Vinilkosmo. Kontribuis: Emilio CID, Bertilo WENNERGREN, Martin WIESE, Ferriol MACIP, Rogener PAVINSKI, David-Emil WICKSTROEM, Gunnar FISCHER, Jean-Marc LECLERCQ, Jenja AMIS, Amir HADZIAHMETOVIC, Flavio FONSECA kaj Floreal MARTORELL.

La Nova Volontulino de TEJO Prezentas Sin

Kasia MARCINIAK, el Bydgoszcz (Pollando)

1. Loĝloko: Bydgoszcz, Pollando.
2. Aĝo: 28.
3. Profesio/studfako/vivokupo: vojaĝ-gvidanto / ĉiĉerono / librotenisto.
4. Ĉefaj aktivajoj/interesoj en la Movado: Agado sur loka nivelo, kunorganizado de kelkaj E-renkontiĝoj (enlandaj), kunredakto de kluba gazeto, sekretario de loka klubo. Mi studis ĉe AIS (Akademio Internacia de la Sciencoj en San Marino), <http://www.ais-sanmarino.org/>, kaj atingis bakalaŭran gradon en turismo.
5. Ŝatokupoj: Mi ŝatas arton, historion de popoloj kaj historion de leĝo (ĉefe mezepoko) kaj vojaĝojn. Kiel vojaĝ-gvidanto mi vizitis ja multe da belaj lokoj. Mi ankaŭ ŝatas lerni

fremdajn lingvojn kaj partopreni en Esperanto-aranĝoj. En libera tempo mi desegnas kaj pentras kaj do ĝenerale artumas. Mi ankaŭ kolektas malnovajn monerojn kaj monbiletojn de diversaj landoj.

6. Kion vi volas atingi dum via oficperiodo: Sekvi la regulojn de la organizo, funkciigi ilin bone; kontribui al ordigado de la TEJO-arkivo, kontribui al disvastigo de informoj pri Esperanto. Uzi mian vivsperton dum laboro por la TEJO-oficejo.

7. Vivdevizo: "Se oni ne povas fari ion kiel oni devus, oni devas fari kiel oni devus" (ekzistas iu nederlanda esprimo kiu sonas: "se oni ne povas ion fari kiel oni devus, oni devas fari kiel oni povas", por mi io devas esti kiel ĝi devus esti, se oni forte volas).

Kunveno en Toruń

La 14-an de oktobro, en la bela kaj historia urbo Toruń (Pollando), okazis E-kunveno, kun partopreno de esperantistoj el diversaj landoj, inter kiuj troviĝis Abraham LANGOUME (Senegalo), Leandro de SOUZA (Brazilo), Lao Ma kaj Xiao Xiao (Ĉinio), Augusto CASQUERO (Hispanio) kaj lokaj esperantistoj.

Maria, de la Etnografia Muzeo de Toruń, prezentis la novan eldonajon: belan kolekton de bildkartoj de la muzeo, bele metitaj en koverton kie aperas la informoj en Esperanto – tio ĉi estis eldono organizita de ŝi mem. Kun Kinga NEMERE oni diskutis pri ebla okazigo de Internacia Ekzamensio de ILEI en tiu urbo, pri kio ŝi



anancis la pretecon ĉion organizi.

Post la agrabla kafumado en la bela kulturdomo, en historia konstruaĵo, kie la lokaj esperantistoj kunvenas, ni vizitis unue la Etnografian Muzeon, kun ĉiĉeronado en Esperanto, kaj poste la

Muzeon de Koperniko, kie ĉiuj, agrable surprizitaj, havis la okazon ĉeesti aŭdvidan prezentadon de la historio de la urbo kaj de la vivo de la granda astronomo, en Esperanta versio.

Augusto CASQUERO



Eŭropa Tago de Lingvoj

Okaze de la Eŭropa Tago de Lingvoj (festata la 26-an de septembro), en la Internacia Studumo pri Turismo kaj Kulturo en Bydgoszcz (Pollando) okazis

speciala aranĝo, kun prelegoj pri tiu ĉi temo. La gestudentoj, el diversaj landoj de kvar kontinentoj, skribis sur la tabulo la frazon “Mi amas vin” en la lingvoj parolataj

de ili. Finfine oni “kolektis” ĉirkaŭ 25 lingvojn, inter kiuj troviĝis la rusa, pola, franca, angla, portugala, hispana, germana, albana, valencia, lingvoj el Afriko kiel diola, *Wolof*, ŝona, svahila, joruba; estis reprezentitaj ankaŭ aziaj lingvoj, kiel ĉina, mongola ktp.

La geprofesoroj kaj reprezentantoj de la studentaro rimarkis la gravecon protekti la diversajn lingvojn kaj kulturojn de la mondo, trezoro de la homaro.


Augusto CASQUERO



Olof OLSSON kaj Daniel SALOMON estas junaj kaj sufiĉe novaj esperantistoj kiuj iniciatis projekton “La Loko” – www.laloko.org. Kadre de La Loko ili organizis multajn tre neordinarajn eventojn por diskonigi Esperanton al la mondo, kaj la TT-redakcio ne povis maltrafi la okazon intervjui tiujn vere talentajn homojn!

- Saluton, kaj sincerajn bondezirojn pri via kuraĝa projekto! Rakontu pri tio kiel vi konatiĝis kun Esperanto? Kio estis la unua – konatiĝo kun Esperanto aŭ la ideo pri la unika projekto, kaj poste adopto de Esperanto por pli bone respuguli vian originalan ideon?

Daniel (D): Saluton! Fakte, mi ne memoras la plej unuan fojon kiam mi aŭdis pri Esperanto. Mi ĉiam sciis ke ĝi ekzistas, sed mi neniam vere interesiĝis pri ĝi. Sed iam hungara amiko de Olof menciis ĝin, ĉar li estis tre frustrata de la devo komuniki angle kun Olof kaj diris ŝerce ‘la venontan fojon ni estos lernintaj Esperanton!’



Olof (maldekstre) kaj Daniel

Kiam Olof revenis al Kopenhago, ni kuniĝis por manĝi kaj paroli. Li rakontis al mi la anekdoton, kaj post longa konversacio ni ekhavis la ideon fari situacian komedion (“sitkom”) en Esperanto. Tiel nia kunlaboro per, pri kaj por Esperanto komenciĝis. La surbendigado de la unua epizodo okazos nur post du jaroj, sed intertempe ni faris aliajn projektojn.

- Vi lernis Esperanton antaŭnelonge, nur en septembro 2003, sed vi jam bone regas ĝin. Ĉu vi havis la okazon praktiki ĝin “persone” – en Esperanto-kunvenoj (UK, IJK, lokaj aranĝoj) – aŭ ĝenerale renkontiĝi kun aliaj esperantistoj? Ĉu vi membras en iuj E-organizoj aŭ havas la okazon foje legi E-revuojn kaj librojn? Kiujn aliajn lingvojn vi parolas?

Olof (O): Efektive, Daniel multe pli bone regas la lingvon ol mi. Estas tiel parte ĉar li estas pli inteligenta ol mi, sed ankaŭ pro tio ke ni rilatas malsame al la lingvo. Kiam Daniel lernis Esperanton, li lernis la regulojn kaj povis tuj sukcese apliki ilin — kiel iu kiu lernas la regulojn de ŝako kaj tuj povas ludi majstre. Miakaze, mi havas neniun problemon *kompreni* la regulojn, sed mi komprenas ilin nur kiel regulojn, kvazaŭ izolitajn. Mi simple ne povas kombini la diversajn regulojn en lingvon. Mi lernas osmoze. Mi bezonas ke certa kvanto da ĝi trapasu mian sistemon — do mi trovas ke multe da legado plej bone funkcias por mi.

D: Iel la estro de la dana junulara organizo estis aŭdinta pri nia laboro, kvankam ni ankorau ne montris ion ajn. Li petis renkonti nin. Ni renkontis lin, kaj li sukcesis konvinki nin ke ni iru al junulara kongreso. Do, en somero 2004 ni iris al IJK, en Kovrov.

O: Tio estis multlirate nekredoblegra sperto. La loko — malnova pionira (komunistaj skoltroj) tendarejo meze de arbaro. Kaj subite ekparoli nur Esperante — la unuajn kelkajn tagojn estis fizike dolore al la cerbo. Kaj la unuan nokton, kiam ni estis alvenintaj en Moskvon, mi devis malsati dum horoj ĉar mi ne povis klarigi ke mi bezonas manĝi. Sed post kelkaj tagoj en Kovrov

mi havis mian unuan songon en Esperanto, kaj la ceteron de la semajno mi sentis min tute trankvila sidante nokte en la kongresa drinkejo, konversacianta kaj ŝercante en Esperanto. Kompreneble mi sentis min ankoraŭ longe for de flua, sed tamen perfekte komforta.

Ŝajne Daniel membras en kelkaj organizoj, tamen mi ne. Mi esperas ke mi baldaŭ estos.

D: Ni penas kontakti lokajn esperantistojn kiam ni vojaĝas. Foje ili kontaktas nin. Kiam ni estis en Vieno, ni ricevis telefonvokon de junulino kiu studas arkitekturon. Ŝia amiko en Germanio legis en retmesaĝo de ni ke ni estas en Vieno. Do tiel ni ricevis Esperantan ĉiĉeronadon pri diversaj interesaj vienaj arkitekturaj vidindaĵoj.

O: Estas tre kortuŝe kiom da bonvolo ekzistas inter esperantistoj. Tio belas. Mi pensas ke tio estas parte pro tio ke oni spertas ke ĝi estas *nia* lingvo. Parolinte Esperanton kun ni la tutan vesperon, nia gastigantino venigis nin al festeto. El ĝentileco ni ĉiuj devis paroli angle. Tio estis tute alia afero. La socia situacio iom perdis sian intimecon. Parolante angle kune ni nevole lasis diversajn kliŝojn trapasi niajn lipojn.

- Ĉu vi reklamas la projekton inter esperantistoj kaj uzas la helpon de aliaj esperantistoj?

O: Ni havas sufiĉe grandan retpoŝtliston kiun ni uzas por anonci niajn aktivadojn. Kaj kompreneble ni enmetis niajn Esperantajn amikojn en ĝin. Sed ŝajnas ke niaj mesaĝoj estas ofte plusendataj inter esperantistoj. Do foje ni ricevas retmesaĝojn de esperantistoj kiujn ni antaŭe ne konis.

D: Eble ni ankoraŭ ne uzas la plenan potencon de la Esperanta reto por reklami nian projekton. Sed la onidiro pri niaj agadoj disvastiĝas rapide sen ke ni laboru aktive por ĝi. Nun ni ricevas afablajn retmesaĝojn el la tuta monda de homoj kiujn ni ne konas.

O: Foje ni uzas la helpon de aliaj esperantistoj. Ĉefe helpo pri la lingvo.

- Ni parolu pri viaj projektoj! Via retpaĝo indikas kiel nunajn (venontajn) projektojn la Esperanto-Tajlandan amikecfestivalon (janu-



aro-julio 2006, Bangkoko) kaj kampanjon por ke Esperanta futbalteamo povu partopreni en la Monda Pokalo 2010 – rakontu pri tio pli detale! Kial ĝuste Tajlando? Ĉu la lokaj esperantistoj partoprenas en la preparado de la festivalo? Kiel ĝi aspektos?

D: Aranĝi Esperantan eventon en Tajlando estis interesa defio ĉar Esperanto estas preskaŭ tute nekonata tie. La ideo estis organizi ion kio similas ceremonian diplomatan kunvenon inter Tajlando kaj Esperanto. Kompreneble kio estas amuza, estas ke Esperanto ne estas lando! Nia buĝeto estis limigita, sed per malmultaj fortaj simboloj kiel flagoj, parolado kaj speciale farita kuko, ni sukcesis fari ion kio aspektis sufiĉe formala. La taja ministerio de eksterlandaj aferoj ne respondis al nia invito, sed pluraj ĵurnalistoj ĉeestis la konferencon kaj skribis seriozajn artikolojn en naciaj ĵurnaloj pri la kunveno kaj Esperanto. Kvankam la afero ĉefe estis humura arta projekto, ni sukcesos divastigi informon pri Esperanto en la taja gazetaro.

- Kaj pri la Monda Pokalo – kiamaniere vi planas reklami la Esperantan futbalteamon? Kaj kiel vi vidas ĝin?

O: Ni penas ricevi ian gazetaran atenton, kaj de nia ĝisnuna sperto, ŝajnas ke ĝi estas temo kiun ĵurnalistoj trovas interesa. Ĝi havas bonan



miksaĵon de diversaj elementoj. Tre populara sporto kiu estas ankaŭ granda komerco; duonfororgesita idealisma lingvoprojekto (pardonu min, sed multaj ja opinias tiel); la surpriza elemento – nenacia teamo konkursanta kontraŭ naciaj teamoj. Al ni tio havas perfektan sencon. Daniel estas dano/franco loĝanta en Britio, mi estas nederlandano/svedo loĝanta en Danio. La ideo ion gajni de t.n. “nacia identeco” ne signifas ion por ni. Estas tute perpleksige al ni la kvanto de sentoj kiujn iuj homoj povas projekcii sur la abstraktajn desegnojn/kolorojn de flago.

D: Pli konkrete, estos teamo portanta Esperantajn futbalĉemizojn. Tio sufiĉas por fari bonan bildon por la gazetaro! Sed ni ankaŭ klopodas aranĝi matĉon inter nia Esperanto-teamo kaj nacia teamo. La ĉefe celo estas ĉeestigi la amaskomunikilojn.

- *Min treege interesis ankaŭ viaj pasintaj projektoj – la unua epizodo de la situaĉia komedio (“sitkom”) “Espero”, farita de profesiaj aktoroj, speciale lernintaj Esperanton, en Instituto pri Nuntempa Arto en Kopenhago. Kiel naskiĝis la ideo pri “sitkomo” kaj kiu verkis la scenaron? Pri kio ĝi fakte temas, kaj ĉu estos daŭrigo? Kiel vi sukcesis ĉion ĉi aranĝi?! Ĉu vi konsideras reala la eblon montri ĝin televide?*

D: La ideo pri Esperanta situaĉia komedio estas la ideo kiu komencis La Loko-n. Tio kio

amuzis nin estis apliki la idealisman kaj nacie sendependan lingvon al la fama formato de usona populara kulturo. Preter la lingvo, ni ankaŭ devis reinventi la mondon en kiu la rakonto okazis. Kompreneble ĝi ne povis simili al tipa usona situaĉikomedio mondo, devis esti Esperanta mondo. Kiel tio aspektas ni daŭre ne povas respondi certe, sed nia situaĉikomedio prezentas proponon.

O: Bonŝance ni ricevis monon de la dana Kulturo-Ministerio por plenumi la projekton. Sen tio la projekto ne eblus. Ni kunlaboris kun profesiaj scenarverkisto, reĝisoro, aktoroj kaj kostumisto. Ili ĉiuj ricevis iom da mono, sed partoprenis ĉefe ĉar ili ŝategis la ideon. Ni ĉiuj laboras intense kaj tempopreme, sed havis bonegan tempon kune. Ni estas precipe danke-maj al la aktoroj – mi daŭre ne komprenas kiel ili lernis la lingvon tiel rapide!

D: La scenaro estis verkita de Lars HUSUM kiu estas profesia scenarverkisto. Temas pri la reklamadejo Espero kie tri tre specialaj knabinoj laboras. En la unua epizodo alia knabino nomata Karena havas laborintervjuon. Ankaŭ la patro de la direktorino partoprenas. Oni malkovras kiel frenezaj ĉiuj estas.

O: Espereble la Esperanto-mondo ne aspektas tiel! Ni elektas tiun ĉi rakonto ĉefe pro ĝia komika potenco.

D: Unue ni devas ‘tondi’ la unuan epizodon, kaj poste ni espereble sukcesos montri ĝin televide. Sed pro ĝia produktokvalito mi vidas la projekton pli kiel prototipon. Por realigi veran televidan serion ni bezonas multe da mono. Eble ni sukcesos iam!

- *Alia projekto, kiu ne povis ne scivolemigi, estas la rapidmanĝejo “Ovo”, kiu proponis en majo-junio 2005 (en Kopenhago, se mi bone komprenis) simplajn bonajn pladojn, kiel, ekzemple, mole boligigitajn ovojn (kio alia?), kun la ekspozicio de Esperantaj libroj en la manĝejo mem. Ĉu la rapidmanĝejo, kun la mesaĝo de bono, estas via respondo al McDonalds?.. Rakontu pli pri tio kiel ĉio*

funkciis. Ĉu vi planas ekigi reton de tiaspecaj rapidmanĝejoj, aŭ ĉu tio estis nur unufoja projekto?

O: Gravas atentigi ke ni ne faras projekton por aserti tion aŭ jenon. Temas pli pri esplorado de iu kampo, klopodante akiri sciojn de tiu esplorado. Farante la Ovo-projekton, ni kompreneble rilatas al la fenomeno de McDonald's kaj aliaj rapidmanĝejoj ĉenoj. Foje kiam oni iras eksteren por manĝi oni volas nur ion simplan. Oni ne volas la tutan ritaron de blankaj tablotukoj, menuo kaj kelnero. Oni simple volas manĝi. Kaj oni ne povas nei ke foje oni volas scii kion oni ricevos. Do, tiusence ĉenoj povas foje esti bona ideo. Sed kompreneble ili fariĝas problemo se ili fariĝas tiel ekonomie fortaj ke ili uzas tiun pozicion por maljuste konkurenci kun lokaj manĝejoj.

Oni kompreneble povas kritiki McDonald's, sed oni ne povas ignori ankaŭ ke la manĝaĵo estas sufiĉe malbongusta, kaj ankaŭ ne tiel sana. Do, interesis nin disvolvi la ĉenkoncepton, sed havi alispecajn manĝaĵojn. Kaj krome interesis nin la fakto ke al multaj homoj McDonald's reprezentas usonan kulturan imperiismon. Ni imagis ĉenon kiu ampleksus Esperantajn valorojn. Ni volis prezenti internacian manĝaĵon, kaj ovoĵo estas io trovebla en kuirejoj tra la mondo. La ovo mem havas tian elegantan, simplan belecon kiel havas Esperanto.

Ni faris la dekoracion, ŝildojn kaj uniformojn sammaniere kiel tradiciaj rapidmanĝejoj ĉenoj, sed kun Esperanta spico. La ĉenoj ofte uzas fortajn kolorojn kiel ruĝon, flavon kaj bluan. Ni uzis brunon, bluan kaj blankon. La reagoj de homoj estis interesaj. La ekspoziciejo kie ni faris la projekto estis sur la teretaĝo laŭ homplena strato. Multaj homoj estis konfuzitaj, ĉar klaris ke ni estis kreintaj strukturon kiu volis ke ili disiĝu de sia mono, sed ili ne komprenis kia entrepreno ĝi estas.

Do, multaj homoj eniris simple por ekscii kio ĝi estas. Tio ne ofte okazas kiam oni faras artekspozicion – eĉ se oni faras tre “malfacilan

arton”, ĉar homoj povas tamen vidi ke temas pri “arto”. Iu virino eniris nur por informi min ke “ovo” signifas ovon en latino (efektive la ĝusta latina nominativa formo estas “ovum” – Red.). Mi demandis al ŝi ĉu ŝi konas la lingvon. Nu, ŝi estis studinta ĝin dek jarojn. Estis maniero teni la menson aktiva, ŝi diris. Sed ŝi ankoraŭ trovis ĝin malfacila. Mi diris al ŝi ke Esperanto estas pli amuza, kun pli rapidaj rezultoj, kaj mi pruntedonis al ŝi rektmetodan lernolibron. Ŝi ekstudis tuj kaj fariĝis membro de la Kopenhaga Esperanto-Klubo.

- Rakontu mallonge pri la aliaj viaj projektoj!

O. kaj D: Ni havas multajn ideojn, sed ni devas fari unu projekton post la alia! Ni pripensas lanĉi Esperantan valuton. La projekto ne temas nur pri la fabrikado de monbiletoj, ni devas pripensi ankaŭ kiel ekigi veran ekonomion. Tio estus grandega projekto se ĝi estus farita serioze.

Alia projekto estas aranĝi Esperanto-kongreson en Antarktio...

- Koran dankon pro via intervjuo – kaj sukcesojn al vi!

O. kaj D: Nia plezuro!

Intervjuis Ĵenja AMIS

Intervjuo tradukis el la angla Joel AMIS



Ni Verku por la Esperantlingva Vikipedio!



Mi starigis promeson ĉe Promesobanko verki almenaŭ po unu artikolon por la Esperanta Vikipedio ĉiutage aŭ po sep ĉiusemajne. Bonvolu konsideri aliĝi www.eo.pledgebank.com/unuvikiĉiutage.

Kial? La Esperantlingva Vikipedio <http://eo.wikipedia.org> estas unu el la plej gravaj iloj por informi homojn pri la ekzisto kaj la kreskado de la Esperanto-Movado. Legante paĝon en sia propra lingvo, homoj tuj vidas, ĉu Esperanta artikolo pri la sama temo ekzistas. Do, se ni verkas pli da artikoloj por la Esperanta Vikipedio, ni ne nur kreas bonegan

enciklopedion por esperantistoj, sed ankaŭ Esperanto aperos pli ofte en alilingvaj Vikipedioj, kaj pli da ne-esperantistoj ekscios pri Esperanto. Speciale ili vidos ke Esperanto ja ne estas morta aŭ malmoderna, kiel multaj homoj ankoraŭ kredas. La Esperantlingva Vikipedio jam enhavas pli ol 60 mil artikolojn kaj tiel estas la 15-a plej granda Vikipedio en la mondo – pli granda ol la indonezia aŭ la araba Vikipedio, ekzemple. Sed la ĉefa celo estos havi pli ol 100 mil artikolojn. Kiam la Esperanta Vikipedio estos tiel granda, oni dissendos tutmondan gazetaran komunikon pri ĝi kaj atingos eĉ pli da intereso al Esperanto kaj al la Esperantlingva Vikipedio.

Ĉu vi scipovas Esperanton sufiĉe bone por kontribui? Ne zorgu – se vi kapablas kompreni ĉi tiun tekston, vi ankaŭ kapablas verki artikolon en Esperanto. Ne forgesu ankaŭ ke aliaj uzantoj povos korekti la artikolon.

Bonvolu aliĝi kaj helpi!

Judith MEYER

Ago-Tago en Bydgoszcz

Okaze de la Agotago kaj ene de diversaj E-programeroj, la gestudentoj de la Internacia Studumo pri Turismo kaj Kulturo, de Bydgoszcz (Pollando) repentris kaj riparis la memortabulon dediĉitan al Doktoro ZAMENHOF, en la samnoma placo (Skwer Ludwika Zamenhofa) – la tabulo estis en tre malbona stato. Antaŭ tri jaroj ankaŭ aliaj gestudentoj riparis la alian memortabulon, kiu troviĝas ĉe la alia flanko de la placo-ĝardeno.

Augusto CASQUERO



Unua Profesia Muzikvideo en Esperanto!



Supernova.
Vinilkosmo.
Donneville, 2006.
Aĉeteblas de UEA,
vinilkosmo kaj aliaj
libroservoj.

La nova disko de Vinilkosmo - "Supernova" - estas produkto de longdaŭra kunlaboro inter tri brazilaj esperantistoj - Roger BORGES (DĴ Roger), Rogener PAVINSKI kaj Ale MANCINI (la bando el tiuj tri personoj havas la saman nomon kiel la albumo mem: Supernova). DĴ Roger estas jam konata al multaj esperantistoj pro la jam aperintaj tri diskoj "Muziko Elektronika", "Elektronika Kompilo" (eldonita de Vinilkosmo) kaj la "Sendependa". "DĴ Roger, jam kontribuanta en la "Elektronika kompilo", estis je origino de tiu ĉi projekto en 2004. Kiam li ankoraŭ prilaboris sonojn malpli pure elektronikajn, li decidis kunlabori kun muzikistoj realaj kaj ne virtualaj", - skribis Floréal MARTORELL en novaĵletero de Vinilkosmo. La disko estis registrita dum 2004, 2005 kaj 2006 en diversaj studioj de Brazilo kaj Hispanio, sed la fina produkto estis eldonita en Vinilkosmo, Francio.

La apero de la disko "Supernova" certe estas granda evento en la Esperanto-mondo pro kelkaj kialoj. Unue, la sonkvalito de la disko estas vere elstara kaj tre profesia. Due, unuafo-

je en Esperantujo, krom la muziko mem, la disko enhavas profesian videon por la unua kanto de la disko, "Pasio en katen", realigitan de la brazila produkteto Kosmuzik. (La video spekteblas ĉe la retpaĝo de Farbskatol' <http://farbskatol.net/dotclear/index.php?2006/10/19/47-supernova-pasio-en-katen>.)

Kvankam la retpaĝo de Vinilkosmo lokas tiun diskon en la kategorio *pop-rok*, laŭ mia vidpunkto, eble estus pli ĝuste loki ĝin en la kategorion de peza roko. La muziko baziĝas sur la klasika pez-roka triopo - drumoj, baso kaj elektrogitaro, kaj ĝi metas malpli grandan akcenton sur voĉan harmonion aŭ "rememoreblan" melodion. La temoj de la kantoj estas tre Esperantaj: amo, mondsolidareco, libero, monda povreco, paco kaj kontraŭo al la milito... En la disko estis uzitaj multaj aldonaj muzikaj kaj voĉaj efektoj: enplektiĝo de krioj, konversacioj (kaj ne nur en E, sed ekz. en la rusa), eĉ pafoj, hunda bojado ktp.

Sed ĉu vere ĉio bonas pri la disko? Kvankam kelkaj kantoj ja ege plaĉis al mi (antaŭ ĉio la "Pasio en katen"), la plejparto de la kantoj estas iom similaj unu al la alia laŭmelodie, kaj pro tio, verdire, iomete tedaj kaj ne vere memoreblaj. La voĉo de la ĉefkantisto (ja foje ankaŭ enplektiĝis la dua voĉo), kvankam nemalbona, ne estas vere elstara...

Sed malgraŭ tiuj kelkaj malbonaĵoj, la disko nemalhaveblas por ĉiuj ŝatantoj de roka muziko, aparte por ŝatantoj de peza roko.

Jane MITCHELL, Usono

La Estraro de TEJO 2005-2007

Prezidanto, IJK

David-Emil WICKSTRÖM
Fuglegårdsvænget 57, 1tv,
Gentofte, 2820 Danio
dew@tejo.org

Kasisto: Katja IGNATJEVA
katja@ikso.net

Ĝenerala Sekretario: Valentina SIDOROVA
3, rue des Nereides
FR-78180 Montigny-le-

Brettonneux
FRANCIO
grimpi@bk.ru

Landa Agado kaj Afrika Agado,

ILEI-rilatoj: François HOUN-
SOUNOU
B.P. 226
BJ – Lokossa, Mono
BENINO
frank@tejo.org

Informado: Chuck SMITH
chuckssmith@gmail.com

Eksteraj Rilatoj, ViC-PREZI-

DANTO: Haris SUBAŠIĆ,
Zagrebačka 40
BA-88000 Mostar
BOSNIO KAJ HERCEGOVINO
hara@ikso.net

Centra Oficejo: TEJO
Nieuwe Binnenweg 176
NL-3015 BJ Rotterdam
NEDERLANDO
Tel: +31-10-436-1044
Faks: +31-10-436-1751
oficejo@tejo.org
www.tejo.org
TEJO-volontulo: Katarzyna
MARCINIAK



★ Ĝis la revido...

ie en Esperantujo! ★